8-a JARO, N-o 385



LEIPZIG, 24. / 3. 1932

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO


SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS dusemajne | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS dusemajne

ŜTUTGART,
la urbo de la 12-a SAT-Kongreso.

Ŝtutgart estas unu el tiuj malmultaj urboj, en kiuj ankoraŭ estas konstateblaj signoj pri la diversaj epokoj de l'urbdisvolviĝo de la mezepoko ĝis nuntempa grandurbo. Apud 4—5-jarcentaĝaj konstruoj staras la plej modernaj. Tamen oni povas diri, ke ĉiam pli k pli estas elpuŝitaj la konstruaj atestantoj pri pasintaj jarcentoj. Burĝojpatriotoj bedaŭras tion. Ili eĉ fondis asociojn por la konservo de antikvaj domoj, monumentoj ktp. Sed laŭ mia opinio tio absolute ne domaĝas, ke malaperas el la urba bildo la malnovaj konstruoj. Povas esti, ke la jarcentaĝaj domoj aspektas tre pentrinde por revuloj k pentristoj. Por proletoj, kiuj kutime devas loĝi en tiaj suspektindaj loĝejoj, certe ne estas agrablo. Volonte ili rezignus tiujn „ĉarmajn“ restadejojn. La homoj, kiuj uzas ilin, estas ĉefe la plej malriĉaj inter la malriĉuloj. Monon ili ne havas, sed multajn dombestetojn: la cimojn. Ni ankaŭ ne forgesu, ke la muroj de la antikvaj domoj estas ofte malseketaj k bona bazo tial por la laborista malsano — ftizo. Do ni ne larmu, kiam la tempo-mezuro de l'disvolviĝo al grandurbo ne haltas antaŭ la romantiko de l'pasinto!




Kompreneble Ŝtutgart, la ĉefurbo de Virtembergo (Sudgermanio), ankaŭ havas aliajn flankojn. Ni volas esti justaj certe. Ekzistas ankaŭ novaj kvartaloj, eĉ tre modernaj loĝ-kolonioj, sed la simplaj proletoj ne povas lui tiujn loĝejojn pro manko da mono. Estas vere, ke laŭ la regna konstitucio germana ĉiu germano havas la rajton je saniga loĝejo. Sed de kie prenu senlabora proleto la monon, por pagi la altan luprezon? —

La situo de l'urbo mem estas bela. Ŝtutgart troviĝas en larĝa valo, kiun ĉirkaŭas somere florantaj ĝardenoj, vinberejoj k altaĵoj kovritaj per arbaroj. Ĉirkaŭ la deklivoj oni vidas ronde la unufamiliajn domojn de l' posedanta klaso, dum la laboranta amaso ĉefe loĝas en la valo interne de kvazaŭaj kazernoj aŭ ĉe la periferio de l'urbo, apud la fabrikoj mondkonataj de Boŝ (Bosch), Dajmler(Daimler)-Benz k aliaj. Kvankam la naturo favoris la urbon Ŝtutgart, ankaŭ per sanigaj mineralfontoj, tie estas multegaj homoj, kiel cetere en la tuta kapitalista mondo, kiuj vegetas en la ombro de l'vivo. Miloj da senlaboruloj malfeliĉe travagadas la urbon, serĉante laboron k panon. Pluaj miloj da laboristoj devas festi ĉiusemajne 3—4 tagojn. Grandega estas la mizero. Tiuj certe ne multe ĝuos la belegajn parkojn, promenadejojn k gigantajn konstruojn. Intestbruas la stomako de l' laborantoj, sed ankoraŭ devigas la ŝtata perforto. Ĉiuj manifestacioj surstrataj estas malpermesataj depost monatoj. Kaj la malakordo de l'proletaro malhelpas la rapidan liberigon de la subprematoj k antaŭenmarŝon al la socialismo; kontraŭe la faŝismo prosperas!

Kun 11 antaŭurboj Ŝtutgart hodiaŭ nombras proksimume 400 000 loĝantojn. Laŭ la oficiala statistiko Ŝtutgart montras bonajn sanecajn cirkonstancojn. Tio devenas ne laste ankaŭ de la diversaj laboristaj arbarhejmoj k naĝejoj, sunbanejoj, ripozejoj, kiujn kreis la proletoj al si mem en liberaj horoj k per propraj rimedoj. La urbo estas fondita verŝajne en la 12-a jarcento. Almenaŭ ekzistas dokumento el tiu tempo. Ĝi estiĝis el iama ĉevalbredejo (*Ŝtute* = ĉevalino). Jam la iama Roma Imperio havis establojn apud Ŝtutgart.

La historio de l'urbo estas tre interesa. Okazis en pli frua tempo ribeloj k sennombraj militaj implikaĵoj. Dum jarcentoj regaĉis sangelsuĉanta, malŝparema, malvirta aro da nobeloj, kiuj senindulge tiranis la popolon. Manpleno da famili-aristokratoj ekspluatadis la potencposedaĵon kiel eble plej por si mem. La „malnova“ kastelo, de kiu antaŭ kelkaj semajnoj forbrulis parto, estis la fortikaĵo por la vampiroj. Cetere la brulo estas bedaŭrinda, ĉar ĝia estingo postulis tri anojn de l'fajrobrigado kiel viktimojn. Pli ol 40 fajrokontraŭbatalintoj malsaniĝis pro la fumo. Kaj tre interesaj k valoraj dokumentoj nepublikigitaj, kiujn posedis la mortinta ŝtata prezidanto Vilhelmo Blos (socialdemokrato), estas detruitaj. Ĉi lasta interrilatis siatempe kun la plej bonaj cerboj de l'germana k inter-


STUTGART. — La kastelplaco k la malnova kastelo.

ĝimo de l'duko Karlo Eŭgeno, kiu cetere ankaŭ vendis siajn subulojn kiel „kanonnutraĵon" al eksterlandaj ŝtatoj. La liberalan poeton Ŝubart li katenigis en malhela karcero dum 10 jaroj. Kaj sub tiaj impresoj Ŝiler verkis poemojn. Kiam Ŝiler publikigis sian dramon „La rabistoj", kiun li unuafoje legis sekrete inter amikoj en la Ŝtutgarta arbaro, tiu sama duko malpermesis al li plue poemi, k la dum la juneco estinta revolucia verkisto Frederiko Ŝiler devis rifuĝi el Ŝtutgart. Tiel aspektis la libero ankaŭ ĉi tie!

Kiel kongresurbo Ŝtutgart estas tre konata. En la j. 1907 (ĝuste antaŭ kvaron-jarcento!) okazis en la urbo tiu kongreso de la IIa Internacio, kiu akceptis la faman rezolucion pri la milito. Dum la Kap(Kapp)-ribelprovo (1920) Ŝtutgart estis la apogejo de l' germana registaro sub gvidado de Ebert.

La organizita laboristaro el Ŝtutgart estas tre vigla. Ĝi aranĝis jam bonegajn manifestaciojn. Tamen ankoraŭ la reakciularo estas sufiĉe forta. Pli ol 40 preĝejoj ekzistas en la urbo ĝis hodiaŭ. Ne estas pro tio miraklo, ke la kultministerio de Ŝtutgart rifuzis al laboristaj esperantistoj, disponi lernejan ĉambron, por aranĝi tie esp-an kurson.

Menciinde ankoraŭ estas, ke vivis multaj eminentuloj en la urbo, ekz. la astronomo Kepler, kies patrinon la „monaĥaj robuloj" denuncis kiel sorĉistinon k volis forbruligi. Plie la filozofo Hegel, la inventisto de l'Cepelin k multaj poetoj. Ankaŭ la revolucia verkisto k kuracisto d-ro Fr. Volf, kontraŭ kiun la ĉi-tiea reakcia juĝistaro nuntempe preparas sensacian proceson pro la abortiga paragrafo 218, loĝas en Ŝtutgart.

Estu bonvenaj Gek-doj, en Ŝtutgart!

Ulo.

nacia laboristaj movadoj. Blos, historiisto, estis batalkamarado de Vilhelmo Libkneĥt k Bebel. Ankaŭ li estis amiko de Karlo Marks, Frederiko Engels, de l'liberecana poeto Frajligrat k m. a.

En la jaro 1503 la 16-jara duko Ulriĥ ekkaptis ekz. la direktilon de l' registaro. Li kondutis freneze. La multekostan kortegvivadon li kompletigis per koruptita administracio k maljusta juĝdecido. Monstraj elspezoj k absurda lukso estis la signoj de lia regado. Senpune la moŝtuloj aplikis ĉiun ajn perforton kontraŭ la popolo. Stratrabo k seksatencoj estis ĉiutagaj okazaĵoj k servis al ili kiel distrado. Ĉiujn devis pagi la popolo. La despotoj praktikis fervore ĉiuspecajn metodojn por trompi la subulojn. Ili inventis impostojn k tributojn, por pagi la ŝuldojn. Moneroj estis malpli valorigitaj, la dogano por vino estis altigita. La mezuro k pezo estis reduktitaj. Ne estas mirinde pro tio, ke tiam kreskis pli k pli la indigno inter la popolo. En la proksimo de Ŝtutgart formiĝis sekreta interfratiĝo de la kamparanoj, „La malriĉa Konrado"; domaĝe, ke ilia ribelo malsukcesis en 1514. Multaj estis mortigitaj aŭ suferis en karceroj k ekzilo. Sed kelkajn jarojn poste la popolo leviĝis denove k forpelis la „de dio senditan dukon".

La sekvintaj princoj havis la ŝancon, refoje trompi la loĝantojn. Regis terura teroro. Hetajroj de l'regintoj elrabis la subprematojn ĝisnude; organizitaj homraboj okazis sub la re-

La perspektivoj de la hispana revolucio.

La tutmonda laboristaro suferinta multajn malvenkojn dum la lastaj jaroj en diversaj landoj, rigardis kun granda atento k plena espero antaŭ unu jaro al Hispanio, kie disvolviĝis sur larĝa fronto furioza atako kontraŭ la diktatoreco perfortanta dum 8 jaroj la hispanan popolon k konstitucion. La revolucia ondo, kiu tie leviĝis k minacante altiĝis, kulminis la 14-an de aprilo 1931 k forbalais la monarkian sistemon, skuante ankaŭ la fundamentojn de la eklezio, kiu dum jarcentoj kune kun la monarkoj k ties trabantoj parazite ĉirkaŭpremis la landon k suĉis la lastan guton de sango el la mizeriĝinta popolo. La laboristoj instinkte sentis, kie troviĝas la ĉefaj kulpuloj k liberigis la vojon al sia malamo kontraŭ la katolika eklezio bruligante monaĥejojn k preĝejojn. Kaj fakte, tiu ĉi religia organizo, unuiginta en siaj manoj la tutan kompetenton pri la kultura evoluo k klerigo de l'hispana popolo dum longaj historiaj epokoj, estas kulpa pri la honta kulturstato precipe de la popolo vivanta sur la kamparo. Preskaŭ la duono de enloĝantoj ne scias skribi nek legi, nek ricevis instruon pri la plej elementaj scioj de nia vivepoko. Neniam la eklezio provis defendi la kampularon brute traktitan de la terposedantoj k ĉiaspecaj uzuristoj. Tio ne estas mirinda, ĉar ja la eklezio mem apartenis al la plej grandaj kapitalistoj de l'lando, posedante ne nur grandajn areojn da tero, sed ankaŭ konsiderindan nombron da kapitalistaj entreprenoj.

En la tago, kiam la respubliko estis proklamata, ĉiuj klasoj de l'popolo entuziasme k ĝojegante salutis la nun akiritan liberon. Ĝis en la lastan vilaĝon ja portis la propagandistoj de la respubliko la ĝojigan informon, ke Hispanio respublikiĝinta eniros la tempojn de feliĉo k harmonio. La mizero havos sian finon, la ekspluatado estos forigata. Tiel oni diris. La kampuloj avide etendis siajn manojn al tiu ĉi savilo k plenfide voĉdonis por la respubliko k per tio faligis la monarkion. La emblemoj de la respubliko ornamis same la malpurajn murojn de kadukaj kabanoj de mizeraj proletoj kiel la frontojn de belaj domoj k magazenoj. Brak' en brako marŝis la socialistaj partiestroj kun la burĝaj politikistoj tra la stratoj de Madrido sub senfinaj ĝojaklamoj de la loĝantaro. La entuziasmema temperamento de la hispanoj ekflamis pri la perspektivo al libero k frateco, por kiuj la respubliko ja nun preparas la fundamenton.

Sed la faktoj estas neŝanĝeblaj. Dum tiuj ĉi tagoj oni forgesis gravan k malnovan veron, veron harditan k elprovitan per maro da sango verŝita dum la daŭro de la historio de la lukto laborista: La homa socio de nia epoko estas dividita en du klasojn, inter kiuj ne estas eblaj paco k harmonio. Tiun ĉi veron la hispana proletaro k ĝiaj direktantoj plene forgesis. La respubliko estis rigardata kiel la ŝlosilo por la pordo al la socia feliĉo. La respubliko kvazaŭ solvu la akrajn klasantagonismojn, ĝi kvazaŭ mirakle sorĉ-estigu la reĝimon de l'socialismo. Oni ne atentis la avertantajn voĉojn sonintajn el la Ateneo k postulintajn, ke la provizora registaro proklamu la revolucian diktatorecon ĝis forigo de ĉiuj centroj de monarkista propagando; ke ĝi disigu la Civilgvardion k policajn trupojn k kreu armitan milicon el laboristoj interkonsente kun la sindikatoj k laboristaj k respublikanaj partioj; ke ĝi malpermesu ĉiujn gazetojn malamike rilatantajn al la respubliko k forpelu la jezuitojn konfiskante senprokraste ĉiujn havaĵojn de la eklezio.

Intertempe baldaŭ plenumiĝos unu jaro, depost kiam la respubliko estas proklamita. La entuziasmo de la laboristoj pasis k mire ili rigardas la paliĝantan idolon, de kiu ili atendis la savon. Ili rimarkas, ke la respubliko ne portis al ili la esperitan savon k hodiaŭ eĉ primokas la „demokratan respublikon de l'laboristoj", en kiu la laboristoj ne havas la rajton paroli. Pli k pli la laboristaro sobriĝas, ekvidante tra la

NI ĈIUJ VIVIGU „LA NOVA EPOKO“-n!

En la antaŭa n-o ni lakone anoncis, ke „La Nova Epoko“ vivos k ke aperos la unua n-o de l'nova kolekto, grandformate, pliampleksigite k bele ilustrite, la 7-an de aprilo.

Ĉu do la savoplano estas efektivigita, ĉu estas kolektita la necesa sumo por garantii la aperigon de 6 sinsekvaj n-oj, kio estis starigita kiel kondiĉo en la alvoko de K-do Lanti, kiu aperis kun „S-ulo“ n-o 368,69? Ne, bedaŭrinde ne! malgraŭ tio, ke multaj K-doj entuziasme ekvarbis k oferis, malgraŭ tio ke nia presisto garantiis pri la unua n-o k la Stokholmaj SAT-anoj pri la dua k tiel montris modelan oferemon! . . .

Sekve ni devas hodiaŭ rezigni pri la origina projekto. Tamen — „La Nova Epoko“ vivos! Certe ĝi ne povus vivteni sin per propraj abonoj kiel memstara revuo; sed ĝi vivos kiel dumonata **literatur-scienca aldono al „S-ulo”.** Ni decidis aperigi ĝin tiel, ke ĝi unufoje dum 2 monatoj anstataŭos n-on de „S-ulo“ k ke ĝin ricevos ĉiuj „S-ulo“-abonantoj senescepte.

Ĉiu leganto tuj ekkomprenos, ke tio estas tre ŝatinda *profito* por la abonantoj de „S-ulo“, ĉar anstataŭ 12-paĝa „S-ulo“ ili tiuokaze ricevos **20—24-paĝan revuon,** samformatan kiel „S-ulo“ k arte prezentitan! Certe tio estas agrabla surprizo por niaj legantoj! En tiu revuo aperos i. a. la pli gravaj libro-recenzoj k la rubriko „Scienco k Tekniko“, kiuj partoj sekve ne plu balastos en la „S-ulo“-n-oj. Ankaŭ la korespond-anoncoj povos aperi en ĝi sampreze k laŭ sama maniero kiel en „S-ulo“, tiel ke sendantoj de anonctekstoj ne bezonas timi pli longan prokraston pro la intermita apero de „La N. E.“ inter „S-ulo“-n-oj. Unuvorte, ni aranĝos la aferon tiel, ke la literaturamantoj havos kontentigon k ke tiuj, kiuj kontentiĝas per la nura „S-ulo“, havos tamen je sia dispono ses ampleksajn kajerojn, per kiuj ili povos varbi sukcese.

Ĉar — la pluson da paĝoj (almenaŭ 8) ni kompreneble ne povas kompensi per la buĝeto de „Su-lo“ aŭ aliaj SAT-kontoj en la nuna ekonomia situacio. La problemo estas do trovi kroman legantaron el almenaŭ **500 abonantoj** al „La N. E.“, kiuj devas esti rekrutataj ekster la rondo de „S-ulo“-abonantoj, ĉar ĉi-lastaj ja ricevas „La N. E.“ aŭtomate.

Ĉu tio estas ebla? Ni estas konvinkitaj, ke jes . . . tial ke la abonprezo por tiu belaspekta dumonata revuo estos **nur 2.50 mk.g., 15 francaj frankoj** (aŭ egalvaloro) **jare:** ĝi sekve estos la **plej malkara literatura revuo esperantista.**

Tial ni turnas nin hodiaŭ per flama alvoko al ĉiuj bonvolemaj K-doj, al ĉiuj legantoj en ĉiuj mondpartoj, ke ili helpu al nia iniciato, trovi en sia loko, en sia regiono abonantojn al „La N. E.“ inter tiuj, kiuj ial ne povas aŭ ne volas aboni al „S-ulo“.

Ni tute speciale ankaŭ petas tiujn abonantojn de „S-ulo“, kiuj povas tion fari, almenaŭ tiom longe, kiom la aparta abonantaro al „La N. E.“ ne transpasis la necesan minimumon de 500 abonantoj, *aboni tamen aparte* la revuon k uzi tiun plian ekzempleron kiun ili ricevos, kiel varbilon. Tiuj K-doj kiuj jam bonvolis pagi laŭ la unue fiksita pli alta abontarifo, trovos kreditigita la pagitan sumon ĉe sia konto en la Adm. de SAT. Ni esperas, ke ili estos inter tiuj, kiuj tamen abonos „La N. E.“ laŭ la nova tarifo, ricevonte tiel du ekzemplerojn (se ili ankaŭ abonas al „S-ulo“), el kiuj unu servu al varbcelo en ilia mano. Kompreneble ni konsideras tian arangôn kiel provizoran k aplikotan nur dum la kriza tempo; nia celo restas aperigi memstare la revuon tuj kiam la cirkonstancoj estos pli favoraj.

Dume organizu specialajn varbovesperojn por „La N. E.“, literaturajn vesperojn, kiuj unike taŭgas por propagandi por la revuo. Diskonigu tiun ĉi novaĵon en ĉiuj esp. medioj. La buŝa varbado ja estas la plej efika. Kaj vi estu certaj: neniu abonanto estos seniluziigita pri la revuo. Do, Gek-doj, agu ĉiu laŭ siaj fortoj, k ni ĉiuj vivigu LA NOVA EPOKO-n!

Direkcio de SAT.

nebulo de erariganta frazaro la profundan abismon inter la ekspluatatoj k ekspluatantoj. Ili komprenas, ke la respubliko nur estas ŝanĝo de formo, sed neniel tuŝas la sociajn cirkonstancojn internajn. Hispanio hodiaŭ estas burĝa respubliko, same kiel Germanio k Francio. Ĉu la reĝlando Anglio estas pli reakcia ol la respublika Francio aŭ Germanio? Kaj ni povas prave demandi, ĉu la respublika Hispanio estas esence pli favora al la proletaro ol la monarkia Hispanio?

Ŝajnas tiel, ĉar Hispanio havas tre progresan konstitucion, en kiu sendube oni cedas al la laboristaro gravajn rajtojn. Tiu ĉi konstitucio estas akceptita de tre radikala plimulto en la parlamento. Sed multaj ekzemploj el la nuntempo montras al ni, ke konstitucioj, kiuj ne baziĝas sur realaj potencoj, nur estas paperaĉo neniom valoranta. La konstitucio plenumita de la Povo laborista fakte ŝanĝus la hispanan ŝtaton fundamente k preskaŭ konformus al la postuloj de socialisma ŝtato. Sed la pezocentro de la potenco ne estas ĉe la flanko de la laboristaro. La laborista tendaro bedaŭrinde estas teatro de obstinaj k malamaj luktoj inter la klasfratoj mem. Kvar aŭ kvin tendencoj luktas por regi super la aliaj. La Komunista Partio direktas akrajn atakojn kontraŭ la anarkistoj k inverse, la komunistoj inter si kverelas, ĉar en Hispanio ekzistas ioma nombro da anoj de Trocki; ĉiuj finfine batalas kontraŭ la Socialista Partio k la Libera Sindikataro. Tiuj ĉi bataloj atingas eĉ tian gradon, ke perfortaj atakoj ofte rezultigas viktimojn de l'revolvero k ponardo.

Ne necesas eksterordinara penskapablo por kompreni, ke movado tiel febranta pro internaj bataloj, ne povas daŭrigi la revolucianagadon. La burĝa malamiko apogas sin ne nur sur bone funkcianta armeo de policistoj k ĝendarmoj, sed ankaŭ sur forta tradicio, kreita de la eklezio. Dum la laboristoj kun ruĝaj vizaĝoj k per fortaj voĉoj diskutas pri la „linioj“ de siaj partioj, la dekstruloj k katolikoj organizas sin k propagandas inter la virinoj, kiuj en Hispanio ankoraŭ estas sub forta influo de la eklezio, por krei la voĉdon-armeon marŝontan en la venontaj balotoj por la parlamento. Estas nenia dubo, ke novaj balotoj plifortigus la ekstreman dekstran flankon, ĉar la proletoj pro la internaj bataloj ne havas tempon kontraŭbatali la klasmalamikon k precipe varbi inter la virinoj. Inter la proletaj vicoj troviĝas preskaŭ neniu kunlaboranta virino. Kiaj taskoj estas antaŭ la laboristaro hispana! Ki-

Abontarifo:
Argentino, pes. 2; Aŭstrio, ŝil. 4; Belgio. belgoj 3; Brazilio, milr. 5; Britio, ŝil. 3; Bulgario, lev. 100; Ĉeĥoslovakio, kr. 20; Danio, kr. 3; Estonio, kr. 2.50; Finlando, mk. 25; Francio, fr. 15; Germanio, mk. 2.50; Hispanio, kiel Francio; Hungario, peng. 4.

Abontarifo:
Italio, lir. 15; Japanio, jen. 2; Jugoslavio, din. 40; Latvio, lat. 3; Litovio, lid. 6; Nederlando, guld. 2; Norvegio, kr. 3; Polio, zlot. 5; Portugalio, esk. 12; Rumanio, lej. 120; Sovetio, rubl. 1.50; Svedio, kr. 3.50; Svisio, fr. 3.50; Usono, dol. 1.

om da laboro estas necesa por organizi la grandan nombron da kampuloj! Tiuj taskoj ne estas solveblaj per senĉesa babilado pri teoriaj problemoj. Certe jes, la teoriaj problemoj devas esti solvataj, sed ili estas solveblaj nur, kiam oni rezignas defendi dogmojn k kiam oni objektive k science pritraktas la problemojn, orientante sin ĉiam laŭ la faktoj rekonitaj de ĉiu. La solvo de tiuj ĉi problemoj neniam estas ebla, kiam oni antaŭ la diskuto jam decidas, kia devas esti la rezulto de la diskuto. Se la spirito de objektiveco ne eniras la cerbojn de la laboristoj, tiam la unuiĝo por komunaj agoj restos bela revo.

Konsiderante k pesante la fortojn inter kapitalistoj k laboristoj en Hispanio, oni povas facile prognozi, ke en proksima tempo plua progreso de la revolucio ne estas ebla. Same kiel en Germanio, malgraŭ rekorda nombro da senlaboruloj k malgraŭ la grandega mizero, la laboristaro ne sukcesas renversi la embarasiĝantan kapitalismon pro disigitaj fortoj, tiel ankaŭ en Hispanio, malgraŭ la granda armeo da laboristoj k kampuloj, la movado ne povas konduki al la celo, ĉar nur unuigita volo kondukas al komuna ago. Ne en lasta linio la SAT-anoj havas la gravan taskon kunlabori por la unuigo de tiu ĉi volo. Tio havas neniun alian signifon, ol savi ne nur la laboristaron, sed la tutan homaron el la verŝajna refalo en barbaran staton. — *tiel 3020*

Pri la komunumaj loĝdomoj en Vieno.

Jam kelkfoje „S-ulo“ menciis la nove konstruitajn popol-loĝdomojn en Vieno, je kiuj meritas la socialdemokrata partio, kies reprezentantoj administras la aŭstrian ĉefurbon. Jes, estas grava merito, ke proletoj — en tiu ĉi tempo de mizerego — povas ricevi sanigajn, helajn, aerplenajn loĝejojn, ekipitajn laŭ moderna tekniko (propra necesejo, elektra lumo, akvokondukilo k gasfajrujo en ĉiu loĝejo eĉ plej malgranda). Ke la socialdemokrata komunumo Vieno sukcesis efektivigi la konstruadon de tiuj kolosaj, belarkitekturaj loĝdomegoj (kun ĝardenkortoj, infanvartejoj ktp) per impostmeto sur la luksajn loĝejojn (en unufamiliaj domoj, burĝaj palacoj ktp), vere estas laŭdinda ago. Tial la enlanda burĝaro ja furiozas kontraŭ la „impostbolŝevismo“ en Vieno, ĉar la komunumo ŝarĝas la riĉulojn por konstrui loĝejojn por malriĉuloj. Tiu faro ne havas analogaĵon en alilandaj urboj k tial ĉiujare aro da fakuloj, gazetistoj, politikuloj ktp venas Vienon por vidi, ekzameni, admiri aŭ kritiki la novajn konstruojn, kies bildoj antaŭbalote varbas eĉ en malproksimaj landoj por la soc.dem partio.

Tamen mi ne volas silenti pri alia fakto, kiu ne kaŭzis entuziasmon, sed malkontenton inter la Vienaj laboristoj. Temas pri la — disdono de la loĝejoj en la belaj domegoj. Estas komprenèble, ke preskaŭ ĉiu volis atingi tian komfortan k malmultekostan loĝejon. Sed la komunumo konstruigis ilin ĉefe pro la loĝejmanko; do unue la senloĝejuloj rajtis postuli esti konsiderataj. Tiuj senhejmuloj ĝenerale devenis el la plej malalta tavolo de l'proletaro; ili ne kutimis loĝi tiel estetike, ili malpurigis la ĉambrojn, hejtis per la pargeta ligno ktp. La komunumo ekaplikis alian metodon: ĝi donis la novajn loĝejojn precipe al bonpoziciuloj (tramistoj, fervojistoj, oficistoj) k la senhejmuloj ricevis malnovajn loĝejojn.

Por ŝtopi la breĉon

12. listo.

8436	Ejabs (Riga)	mk.g.	4.—
9332	Lievestro (Zwolle)	guld.	1.50
10512	Garten (Rotterdam)	guld.	1.50
8139	Balicki (Stonava)	kr.ĉ.	10.—
14303	Lamouille (Ĝenevo)	fr.svis.	3.—
8066	Swoboda (Vieno)	ŝil.aŭ.	2.—
17484	Delsen (Amsterd.)	guld.	1.50
14946	van't Hof (Amsterdam)	guld.	1.50
13343	Kosteravs (Riga)	lat.	2.—
8436	Ejabs (Riga)	lat.	2.—
17191	Helmans (Riga)	lat.	—.20
17597	Uitterdijk (Hilversum)	mk.g.	5.—
13448	Jaegge (Eberswalde)	mk.g.	1.10
3771	Schröter (Leipzig)	mk.g.	1.—
1162	Häckel (Leipzig)	mk.g.	1.50
670	G. P. de Bruin (Enschede)	guld.	1.—
	Anarkista Esperanto-Grupo (Stokholmo)	fr.fr.	50.—
16860	Friedrich (Gränitz)	mk.g.	1.—
	Munoz (Cuers)	fr.fr.	5.—
	Erlich (Pamiers)	fr.fr.	3.50
16920	Tundt (Colmar)	fr.fr.	8.—
	H. B. (Annecy)	fr.fr.	12.20

Sed per tio ne malofte amikoj aŭ parencoj de influhavuloj en la partio estis preferataj, k estiĝis atmosfero de aspirado, enviado k eĉ koruptado. Okazis, ke oni donis komunuman loĝejon al tiuj, kiuj jam havis tian en privata domo, sed estis funkciuloj en la partio aŭ havis bonkonaton inter la partigvidistoj. Aliflanke novgeedziĝintoj, ankaŭ kun infanoj, devis atendi kvar aŭ kvin jarojn sen hejmo, ĝis ili ricevis propran loĝejon.

Unuvorte, okazis maljustaĵoj k nekorektaĵoj. La malpreferatoj kverelas kontraŭ la protektatoj k protestas, ke partiaj altranguloj unuavice konsideris sin mem. Ja foje distrikta partiestrarano volis enloĝiĝi, sed la senhejmuloj malebligis tion per bruado k insultado. Ĉu necese? La partio nur malutilis al sia reputacio. Kulpas pri tio la egoismo de la homoj, kiuj memame opinias, ke bonaj institucioj nur ekzistas por ia profesio aŭ partianeco. En la soc.dem. partio la egoismo apenaŭ ludas malpli grandan rolon ol inter burĝoj, ĉar la partio bedaŭrinde ne klopodas pri morala edukado de siaj anoj.

Rilate al la komunumaj loĝejoj do ne ekzistas unuanime entuziasmiĝinta amaso, sed unuj gloras la komunumon (ĉar ili ricevis loĝejon), dum aliaj plendas k grumblas (ĉar ili estis malpreferataj). Kaj la burĝaro kapablis eluzi tiun situacion. Oni logis la malkontentulojn for de la proleta klaso k pro tio nun sufiĉe granda nombro da laboristoj staras en la burĝa tendaro. (La faŝisma movado ja nur kreskas pro malkontento inter proletoj.) Fakte el tiaj malkontentuloj eĉ iĝis perfiduloj, kiuj denuncis la partion al la polico por konfisko de kaŝitaj armiloj ktp.

Jen la sekvoj de tro senzorgema, neprudenta sinteno en la Viena soc. dem. partio. Granda politika partio ne povas riski malpopularon. Kvankam mi plene aprobas la konstruadon de la komunumaj loĝdomegoj, mi malkaŝe konfesas, ke la vojo rilate al la loĝeja disdono ofte estis malĝusta, ĉar nerekta. *Klarvidulo.*

El Portugalio.

La 29-an de februaro devis okazi striko en Portugalio, precipe en Lisbono. La komunista partio ordonis ĝin. La socialistoj estis kontraŭ ĝi. La anarkosindikatistoj lasis agi la anojn de siaj sindikatoj laŭvole.

Oni anoncis manifestacion de la malsatuloj k senlaboruloj subtenotan de la klaskonsciuloj. Sed fakte oni intencis ekfari revolucion.

Sed ĉar du komunistoj (laŭ flugfolioj disdonitaj) estis perfiduloj, la intencita batalo ne okazis. Nur oni ne scias, ĉu la kontraŭ-ordono al striko estis farita de la komunistoj mem aŭ aranĝo de l'polico; multaj K-doj asertas tion lastan.

Mi estas certa, ke se ĉi tiuj tri partioj: komunistoj, socialistoj k anarkosindikatistoj unuiĝus nur ĝis falo de la diktatoreco, ĉi lasta jam estus malaperinta. Ili volas tamen, ke la revolucio okazu. Neniu ano el tiuj tri partioj estus pli feliĉa ol se la supozeblaj batalantoj venkus. Nur, ili volas ankaŭ partopreni la honoron pri la venko, ĉiuj, aplikantaj tamen la plej malgrandan kvanton da iloj por la okazo. Malfeliĉuloj! La baldaŭaj luktoj en la tuta mondo ne estos surprizaj kiel antaŭe. La bataloj devos esti farataj, sen ke fidirektantoj volu gloriĝi per ili.

La eksplodo de revolucio en ĉi tiu lando fakte ne okazis pro la troa memestimo de la gvidantoj de l'laboristaj partioj, pro perfidoj, se ne de la homoj konsiderataj kiel K-doj, de iuj el iliaj konatoj; ankaŭ pro malkuraĝego de granda kvanto da malsatuloj. Ekzemplo: en la arsenalo, ŝtataj fabrikoj k oficejoj, laŭ supera ordono ricevita, la ĉefoj k estroj de la laborejoj parolis al la laboristoj dirantaj, ke se en la tago, por kiu estis anoncita striko, ili forestus, ĉiu mankonto estus maldungota. La simpatiantoj de la movado en tiuj ŝtataj laborejoj estis tri kvaronoj; preskaŭ ĉiuj el tiuj tri kvaron-

Kiu eraras pri la alkohol-malpermeso en Usono?

Laŭ la vidpunkto de la por- aŭ kontraŭuloj, la alkohol-malpermeso aŭ ruinigis Usonon aŭ transformis ĝin en paradizon. La fakto tamen estas, ke preskaŭ ĉiuj argumentoj de ambaŭ flankoj estas senvaloraj. Pri tio, kio vere okazas, preskaŭ ne ekzistas aŭtentika materialo.

Kiam mi antaŭe intencis skribi artikolon pri la alkohol-malpermeso, mi eltrovis, ke ju pli mi tralegis da dokumentoj, des pli mi konfuziĝis. Por ĉiu argumento alportita de unu flanko, mi **trovis alian argumenton**, kiu pruvis la malon. La statistikojn eldonitajn de ambaŭ partioj mi konsultis, sed mi konvinkiĝis, ke tiuj fontoj ankaŭ ne estas fidindaj.

Tial, en la artikolo, kiun mi verkis antaŭ du jaroj por „S-ulo", mi malatentis pruvi per statistikoj aŭ tabeloj, la sukceson aŭ malsukceson de la malpermeso. Tio ja ne estis mia intenco. Mi nur volis doni al la legantaro la konkludojn de miaj propraj spertoj k observoj, kiujn mi faris en la densloĝataj laboristaj kvartaloj de Nov-Jorko. Pri tio, kion mi vidis proprokule, fortigite per la kompakta rezulto de mia legado k pridiskuto, mi intencis skribi.

Inter tiuj, kiuj favoras aŭ atakas la malpermeson, regas buŝeg-batalo. Terura k ofte amuza estas la fanatikismo ambaŭflanka. Mensogulo, hipokritulo aŭ fantaziulo estas nur tre moderaj esprimoj, ĵetataj al la malamiko. Sed mi ne intencas sekvi la ekzemplon de venena kriegado, nek de la piaj pastroj, nek de l'bierfaristoj. Mi scias, ke miloj da laboristoj tra la mondo interesiĝas pri la malpermesa problemo en Usono. Fantaziojn aŭ mensogojn ili ne ŝatus.

Ne estas nur el Usono, de kie ni ricevas la plej kontraŭstarajn opiniojn pri la efiko de l'malpermeso. Tio rilatus ankaŭ informojn, kiujn ni ricevas pri Sovetio k Finlando. Laŭ niaj „malsekaj"[1] amikoj la malpermeso en Sovetio k Finlando fariĝis humiliga malsukceso. Ni ja konas la argumentojn; ili estas, ke la laboristoj k kamparanoj venenis sin per memfaritaj alkoholaĵoj; ke la senmoraleco de la junularo kreskis, k pro la malpermeso la popolo kutimiĝis al netolerebla malestimo por la ŝtataj leĝoj. Tion, k multajn aliajn malbonojn ekzistantajn en nia socio, ili riproĉas al la „malbenita alkohol-malpermeso".

Tio estas tamen nur la opinio de unu flanko, k estas honeste, se ni paroligos ankaŭ la opozician partion. Pri la nuligo de l'malpermesa leĝo en Sovetio, la konata holanda komunistino Henrieto Roland Holst skribis jenon en la holanda soc. gazeto „Bevrijding" (15. 3. 31): „La milito liberigis Sovetion de unu diablo: la diablo, kiu kuŝas en la drinkbotelo; falsa konsolanto super la sklaveco, instruisto pri malbona humilo; instiganto al bruta perforto. Ili bezonas monon. Mono ne odoraĉas! Ĉu ili ne estas realistoj? La drinkmanio fariĝas fonto de enspenzoj por la unua socialista ŝtato. La amaso denove drinkegas k drinkas ĝisfreneze. Malpaco k diboĉo pliiĝas. „Huliganismo" (luksvivemo), banditismo, seks-ekscesoj. La komunista junularo estas infektita. Kiel seksardaj bestoj la pli fortaj atakas la fizike k ekonomie pli malfortajn. Malvirgigo k memmortigo."

Tiu priskribo de H. Roland Horst ŝajnis al mi nekredinda. Tamen, por la profito de kelkaj skeptikuloj, mi citos ion el la raporto de Gregoro Sokolnikov, sovetia ambasadoro en Londono. Ni trovas tiun raporton en lia libro titolita: „La soveta politiko en publikaj financoj" (pĝ. 194,99)[2]. Li skribas: „Absoluta sobro, almenaŭ por iom da tempo, estas super la fortoj de la juna socialista ŝtato. La registaro devis forigi la malpermeson pro du kialoj. Unue, pro la fakto, ke la kamparanoj mem faras k forvendas alkoholaĵojn, la t.n. „samogo", k due pro la financa blokado k la neceso rapide akiri monon por provizi la industrion k forigi la ekonomian krizon. La disvendado de registara „vodka" (brando) havis tre malagrablajn efikojn por la loĝantaro k speciale por la laboristoj. Ebrio duobliĝis k la laborkapablo de l'industriaj laboristoj videble malkreskis."

Same kiel pri Sovetio mi tralegis abundon da dokumentoj pri Finlando, kiuj montras, ke la malpermeso ne estas tiel malsukcesa kiel multaj volas kredigi al ni. Se ni atente tralegis la enhavon de ambaŭ elĉerpoj (de H. Roland Holst k Sokolnikov), ni ricevis la impreson, ke la sovetia popolo estis sur la vojo al kompleta sobro. Sed ĉu la „malsekuloj" en Usono ne rakontas al ni ion tute alian? La malpermeso en Sovetio k Finlando estas granda malsukceso, ili diras al ni. Se mi estus kontenta defendi nur niajn „sekajn" aŭ „malsekajn" kriegulojn, mia tasko estus multe pli facila, ĉar tiam mi nur kopius la argumentojn de la piaj pastroj aŭ bierfaristoj.

Estas rimarkinde, ke la socialistoj tute ne ŝatas pridiskuti la alkoholmalpermeson. La konservativaj laborist-gvidantoj rakontas al la popolo, ke se la registaro denove permesus la vendadon de alkoholaĵoj, tiam milionoj da laboristoj akiros laboron; „la samon oni ankaŭ promesas al la finlandaj laboristoj".

Sed inter la tuta usona laborist-movado ekzistas la observinda unuanimeco, ke oni ne redeziras la fabrikadon k forvendadon de la antaŭa usona nacia drinkaĉo, la *viskio*. En aliaj landoj la laboristoj plej multe trinkas bieron aŭ vinon, sed antaŭ la malpermeso la usona laboristo trinkis la altpocente alkoholenhavan viskion, tiun abomenan venenon, kiu subfosas la psikan k fizikan sanon.

Laŭtaj estas la protestoj de burĝaj ... oj intencis striki; ili ne faris tion post aŭskulto al la estroj (ne ĉiuj sciis pri la flugfolio). Tamen ili permesis, ke la plej kuraĝaj, kelkaj dekoj, vidantaj nur, kion ili ĝuste devas fari, k strikantaj, estu efektive forpelitaj. Se ili estus fermintaj siajn orelojn al la diroj de l'mastroj, ili strikus sen konsekvencoj por iu ajn. *Herta N., Lisbono.*

[1] Tiuj, kiuj estas kontraŭ malpermesaj leĝoj pri alkoholo. — *Red.*

[2] Soviet Policy in Public Finance.

EL LA LIBROSTOKO DE SAT

havigu al vi jenajn rekomendindajn k malkarajn legaĵojn:

Volter, KANDID. Sprita k pensiga rakonto, 162 p. bind. 3 mk.g., broŝ. 1.50 mk.g.

London, la Fera Kalkanumo. 368 p., bind. 3.50, broŝ. 2.50 „

Lenin, Ŝtato kaj Revolucio. 160 p. . . . . . . 0.80 „

Vortoj de K-do E. LANTI. 192 p. . . . . . . 1.80 „

Kropotkin, ETIKO. 240 p. . . . . nur 1.20 „

Protokolaro pri la XI-a SAT-Kongreso

(Amsterdam, aŭg. 1931). 112 paĝoj. Grava, aktuala dokumentaro. Por SAT-anoj k abonantoj al „S-ulo" 0.15 mk.g. por aliaj 0.45 „

ADMINISTREJO DE SAT, Kolmstr. 1, LEIPZIG O. 27.

politikistoj k bierfaristoj kontraŭ tiu malnobla atako al la „persona libero“. Mi ne ŝatas amikiĝi kun tiuj elementoj, por kiuj la ideo pri persona libero estas nur konvena politika ludpilko.

Sokolnikov rakontis, ke la rusaj laboristoj ne estas kontentaj pri 20 aŭ 30% da alkoholo enhavanta „vodka“. Ili petis 40%-alkoholan brandon. Mi ne povas juĝi, ĉu tio estas vera. En Usono la plej granda parto de la popolo ne redeziras la viskion, kies alkoholenhavo estas proksimume je 45% pli malgranda ol tiu de l'rusa „vodka“ („vodka“ 40%; viskio 23%).

Ŝajnas, ke la granda plimulto da socialistoj k aliaj ricevas informojn pri la usona malpermeso el burĝaj gazetoj, ĉar aliel mi ne povas kompreni, kial ili kredas tiujn mensogojn el burĝaj rondoj. La malpermeso, ili diras, metas pezan financan ŝarĝon sur la popolon. Flanke de la elspezoj por militismo tiu sumo estas sensignifa, sed neniu parolas pri tio forigi la armeon k militŝiparon, kiuj englutas 85% el la tutaj usonaj impost-enspezoj.

La malpermeso estus grandparte efektiva, se ne la korupta policistaro k ŝtatoficistaro ebligus la cirkuladon de granda kvanto da neleĝa alkoholo. Policistaro k oficistoj estis ĉiam koruptitaj, tion ne faris la malpermeso de alkoholo.

Nun ekzistas tiuj t. n. sekretaj drinkejoj, la „speakeasies“, kie oni povas aĉeti drinkaĵojn. La registaro antaŭ kelkaj jaroj elektis la konatan „Wickersham“-komitaton, por esplori tiun situacion. Pasintjare ili submetis raporton al la prezidanto. Ĝi montras la troigojn de kelkaj komitatanoj. Ekzemple la komitatano J. Forester (prezidanto de usonaj ekpreslaboristoj) raportis, ke la nombro da tiuj „speakeasies“ estas proks. trioble pli granda ol la nombro da „saloon“-oj[1] antaŭe.

Alia komitatano, A. W. W. Ŭudkok (Woodcock), direktoro de alkohol-malpermeso, „pruvis“(?) per statistikoj k nombroj, ke en malgrandaj urboj la nombro da „speakeasies“ estas 20-foje k en la grandaj urboj 3–4-foje pli malgranda ol la nombro da „saloon“-oj antaŭe. Eble la vero kuŝas mezvoje. Multaj el tiuj ejoj posedas nur kelkajn botelojn. La laborista junularo ne vizitas tiujn lokojn; tie oni trovas la maljunulojn. Eble tiun aserton K-do Savil nomas fantazia, ĉar „mi diris tion antaŭe“ k li eble povas „pruvi“, ke tio estas mensogo?

Ankaŭ ekzistas la erara opinio, ke la usona laboristaro venenas sin per memfaritaj venenaj alkoholaĵoj. Kia estas la vero pri tio? La vero estas, ke granda parto el enmigrinta popolo, speciale la itala k aliaj vintrinkantaj popoloj, mem faras ian specon de sendanĝera vino el vinberoj. Dum la malpermeso la konsumo de vinberoj triobliĝis.

Sed la plej granda parto da laboristoj ne atentas; aŭ ili ne plu trinkas aŭ nur ĉe specialaj okazoj. La malpermeso estas la produkto de protestantaj eklezioj k de tiuj, kiuj volis forigi la domaĝon, kiun la ebrio okazigis al la industrio. La registaro ne povas subpremi la korupton de la policistaro, k instigite de „sekaj“ fanatikuloj granda kvanto da alkoholo en Usono estis venenita. Tuj disfamiĝis tra la mondo sciigoj pri grandskalaj alkoholveneniĝoj. Se ni pristudas la nombrojn de la „Metropolitian Insurance Co.“ (Metrop. Asekur-Asocio), preskaŭ la nura fidinda fonto de informoj, ni vidas, kie kuŝas la vero.

Antaŭ la malpermeso laŭ la Metropola Asekur-Asocio la mortoj pro alkoholveneniĝo estis por 100 mil personoj en la jaro 1916: *5,4;* 1917: *5,2;* k por la jaro 1925: *3,3;* 1926: *4,1* k 1929: *3,4.* Ĉu la faktoj ne pruvas, ke eĉ dum tiuj jaroj, kiam la registaro venenis la alkoholon, la mortonombro estas proksimume je 50% pli malalta ol antaŭ la malpermeso? El la 18 milionoj da poliso-tenantoj, la Metropola Asekur-Asocio menciis tridek personojn, kiuj mortis pro alkoholveneniĝo. Mi ne neas, ke tiu nombro estas terura, sed estas evidente, ke se ne ekzistus malpermeso, la nombro ne estus pli malalta. „Per la malpermeso la junularo de Usono senmoraliĝis.“ Alia argumento de la „malsekuloj“. Klarenco Daroŭ (Darrow), konata advokato, A. Frank Pen (Payne), psikologo, R.N. Boldŭin (Baldwin), direktoro de Unuiĝo por civila libero, ĉiuj estas fervoraj kontraŭuloj al la malpermeso, sed ili malkonfirmas tion, dirante, ke la nuna juna generacio estas pli honesta, pli konsekvenca k pli pura, entute staras morale pli alta, ol ĉiu antaŭa generacio. Se ni pacience k objektive konsideras ĉiun argumenton, unu post la alia, kontraŭ la malpermeso, ni trovas, ke la plejmulto estas mensogoj, troigoj, k tiam ni ankaŭ povas konkludi, el kiuj fontoj ili venas.

Multaj en niaj rondoj kontraŭstaras al malpermeso, sed ne ĉar la junularo senmoraliĝis aŭ ĉar la laboristaro venenas sin. Ankaŭ ne ĉar la malpermeso estas peza financa ŝarĝo aŭ koruptis la policistojn k ŝtatoficistojn. Estas la propagando de la burĝaj gazetoj, kiuj dissemas tra la mondo tiujn mensogaĉojn. Pro tio ankaŭ la socialistoj silentis. Ili ankaŭ esperas politike gajni, k nun ili postulas novan referendumon por eltrovi, ĉu ĉi tiu leĝo estas populara. Sed ni devas diferencigi inter la argumentoj de burĝoj k progresemaj elementoj kontraŭ la malpermeso. Kaj se ni faras tion, ni pli bone komprenas la situacion.

La ideo estis, per aŭtoritataj rimedoj sobrigi la laboristojn de Usono. Ĉu oni sukcesis? La Novjorka korespondanto de l' Manĉestra Gardisto (Manchester Guardian) antaŭ unu jaro raportis, ke oni sukcesis je 75–80%. Kaj tion mi ankaŭ opinias. Krome li diris preskaŭ la samon, kion mi jam antaŭ du jaroj skribis en „S-ulo“. La riĉuloj, kiuj povas pagi por multekostaj drinkaĵoj, ne intencas obei la leĝon. Koruptajn politikistojn k policistojn aŭ grandskale alkoholon kontraŭbandantajn banditojn la leĝo ankaŭ ne kaptas, estas plej ofte nur la laboristo, kiu posedas iom da viskio aŭ klopodas gajni iom da mono per ĝia vendo, kiu estas la ĉefa viktimo de tiu ĉi leĝo, same kiel li estas la ĉefa viktimo de ĉiu kapitalista leĝo. *Pro tio* ni kontraŭstaras al la malpermeso, sed ne pro la mensogaj argumentoj de la burĝoj. Se ne estus la konstanta propagando en la grandaj burĝaj gazetoj, mi dubas, ĉu la laboristaro interesiĝus entute pri la problemo. Tamen, k tion ankaŭ K-do Savil ne povas nei, la usona popolo ne redeziras la altpocent-alkoholan viskion. Ankaŭ la malpura drinkejo, la „saloon“ apud la stratangulo, tute malpopulariĝis.

La malpermeson de alkoholaĵoj en kapitalista ŝtato mi rigardas nur kiel „interesan eksperimenton“. Kulturvaloron ĝi ne havos tiel longe, kiel ekzistos mizero k ekonomia malsekuro. En socialisma socio la drinkmanio malaperos, tamen ni ne devas esti blindaj pro nunaj plibonigoj.

Mi ne intencis kopii la argumentojn kontraŭ la malpermeso el burĝaj gazetoj. Por akiri materialon k informojn, mi serĉis en niaj propraj rondoj. Mi parolis kun socialistaj, komunistaj k anarkistaj propagandistoj, kiuj ĉiuj konas Nov-Jorkon pli bone ol mi. Alivorte mi serĉis informojn tie, kie mi estas almenaŭ certa, ke honesta k objektiva esploro donas la plej kontentigajn rezultojn.

Mi ne ŝatis skribi tiun ĉi artikolon, ĉar ekzistas pli gravaj problemoj ol la alkohol-malpermeso. Tamen ĉar K-do Savil deklaris, ke mi fantaziis aŭ eĉ mensogis, mi nur klopodas pruvi, ke mi ne estas la sola „fantaziulo“. Estas tre facile protesti, ke „S-ulo“ ne estas boninformata gazeto. Sed li forgesis ĝin pruvi. Krome lia saĝaĵo, ke li *scias* pri kio li verkas k ne komprenas la vorton „objektiva“, estas vere amuza.

G. J. Kroes (10 472).

[1] Antaŭ la malpermeso ekzistintaj ordinaraj trinkejoj. – *Red.*

Korektoj. – K-do G. Savil petas nin korekti en lia artikolo, publikigita en n-o 382, jenon: (p. 112, linio 5 de supre) estu „Industria Ligo Unuiĝa“ (Industrial Union League) anst. „Ind. Ligo Laborista“; (p. 112, 3-a kol., linio 13) devas esti: „. . . pli bone mi ripetas, ol *Lenin*, kiel apliki . . .“ (anst. „ol *De Leon*“). – En la n-o 384, pĝ. 138, 3-a kolono, 25-a linio de *malsupre*, legu: „La LEA-estraro helpis (anstataŭ . . . kulpis) tiurilate . . .“

Letero al eksterlandaj laboristoj.

De Rusa labkoro.[1]

Moskvo, 10. II. 1932.

Karaj K-doj!

En la nomo de gelaboristoj k lab. junularo de nia teksfabriko Krasnoĥolmskaja mi sendas al vi varmajn salutojn. Samtempe mi volas konigi al vi pri nia sukcesa laboro en la socialisma konstruado k precipe pri la realigo de l'industria plano (promfinplan) en nia fabriko.

Por realigi la antaŭskizitan planon de la produktado, ni mobilizis ĉiujn laboristojn, altirante ilian atenton al la eblo realigi k superi la planon. Samtempe ni mobilizis ĉiujn industriajn resursojn (eblojn materialajn k energiajn), nuligante ĉiujn eblajn defektojn (? *Red.*) k interrompojn en la laboro. Okaze de la plej etaj defektoj (?) ni faris alarmon, por atentigi ĉiujn pri la necesa plibonigo en la produktado. Kaj ni tuj korektas k nuligas ĉiujn defektojn (?) trovitajn k levas la kvaliton de la laboro k produktaĵo.

Tute hazarde naskiĝis novaj formoj de la laboro, kiuj nomiĝas: socialista konkurado, atakbrigada laboro k transpasantaj brigadoj. Ĉi lastaj havas la taskon helpi la venkon super la malfaciloj de ĉiuj laboristoj en ĉiuj laborprocedoj k laborfakoj.

Nia fabriko alvokis por socialista konkurado ĉiujn aliajn fabrikojn najbarajn. Kaj pro la malfruiĝo de unu aŭ alia el la konkurantoj, la sukcesantaj fabrikoj helpas al la malfruinta per siaj sperto k organizado de la labormetodoj. Kaj tiel ni sukcesis levi la produktadon de la malfruintaj fabrikoj ĝis tiu de la bone progresinta.

Ĉiuj junaj laboristoj k precipe la komjunularo partoprenas la likvidon de la analfabeteco ĝenerala k profesia: ni vizitas diversajn kursojn k politeknikajn lernejojn. Dank' al tia entuziasma k intensa laboro, same kiel al la ĝusta gvidado de la komunista partio, nia fabriko Krasnoĥolmskaja sukcese finis sian „promfinplanon" antaŭ la fino de l'jaro. Ni opinias, ke ankaŭ vi kiel laboristoj en la kapitalistaj landoj povas apliki la socialistan konkuradon k atakbrigad-laboron en la fako de revolucia laboro: varbi novajn membrojn al komunista partio, gajni novajn membrojn al komunista junularo, pligrandigi la distribuon de la revolucia ĵurnalaro, partopreni la batalorganizojn kontraŭ la faŝismo, helpi la organizadon de la unueca ruĝa fronto de ĉiuj laboristoj.

Karaj K-doj, bonvolu respondi al ni, ĉu vi gvidas tian laboron k sukcesas en ĝi aŭ ĉu vi volas komenci energian partoprenon je tia laboro?

Plue ni petas respondi al jenaj demandoj: Kun kia rapido la ekonomia krizo kaptas vian landon, apartajn urbojn k regionojn, donu kelkajn statistikajn nombrojn. Kia estas la stato de la laboristoj ĝenerale, de la laborantoj k senlaboruloj? Kia estas la revolucia movado inter la laboristoj k kamparanoj en via lando k apartaj regionoj? Kia estas la amplekso de la senlabor-eco, la ŝtata subvencio k sindikata? Kion skribas la kapitalistoj pri USSR k kion opinias pri tio la laboristoj k kamparanoj? Kiaj estas la metodoj de la lukto kontraŭ la kapitalistoj?

Se vi povas, kunsendu bildojn k fotojn ilustrantaj la priskribon. Kion vi faras por diskonigi la veron pri USSR k por defendi ĝin okaze de imperiista milito kontraŭ USSR?

Kun revoluciaj salutoj en la nomo de la laboristoj de l'fabriko Krasnoĥolmskaja.

Mikaelo Jakŝinskij.

P. S. Skribu al ni: USSR, 9, Poŝtkesto 321, KIFINTERN (por M. Jakŝinskij).

[1] Laborista korespondanto.



Kun tiu ĉi numero finiĝas la abonoj de la unua kvaronjaro. Per tuja reabono vi evitas interrompon en la ekspedado.



Naciaj limoj malhelpas al la homaro.

En meza Germanio, proksime de la urbo Ŝlajc (Schleiz) estas strato, sur kiu en longo de 6 km dekunufoje alternas la ŝtatlimoj:

1.– 113 metr. sur prusia teritorio,
2.– 235 metr. sur turingia teritorio,
3.– 10 metr. sur prusia teritorio,
4.– 245 metr. sur turingia teritorio,
5.– 302 metr. kun limo en la mezo de la strato,
6.– 998 metr. sur turingia teritorio,
7.– 147 metr. sur prusia teritorio,
8.– 186 metr. sur turingia teritorio,
9.– 207 metr. sur prusia teritorio,
10.– 92 metr. sur turingia teritorio,
11.– 2796 metr. sur prusia teritorio.

Alterne oficas, konstruas sur tiu ĉi strato, – jen prusoj, jen turingoj. Jam depost 1815 oni klopodas ĉi tie plibonigi la limrilatojn. Per la ĝis nun faritaj 95 kontraktoj oni finfine atingis la rezulton — supre montritan.

Tamen – restas espero por ni sennaciistoj. Malrapide, iom post iom, helpiĝas en la kapoj:

Sur germania teritorio ekzistis

en la jaro 1793	–	323	apartaj ŝtatoj,
en la jaro 1803	–	211	apartaj ŝtatoj,
en la jaro 1816	–	42	apartaj ŝtatoj,
en la jaro 1860	–	37	apartaj ŝtatoj,
en la jaro 1871	–	26	apartaj ŝtatoj,
en la jaro 1931	–	17	apartaj ŝtatoj.

J. Burger (601).

POR NIA MEDITO.

Pri absoluta vero.

Nia sento instigas nin, unue, kredi, ke ni kapablas koni la absolutan veron; sed la studado forprenas de ni tiun ĥimeran pretendon. La scienco ĝuste havas la privilegion instrui nin pri tio, kion ni ne scias, anstataŭante la senton per la racio k la eksperimentado, k montrante al ni klare la limojn de nia nuna konkapablo. Sed, per iu mirinda kompenso, laŭgrade kiel la scienco malaltigas nian fieron, ĝi pligrandigas nian kapablon.

La scienculo, kiu daŭrigis pri fenomeno la eksperimentan analizon ĝis la relativa determinismo, sendube vidas klare, ke li ne konas tiun fenomenon en ĝia unua kaŭzo, sed li fariĝis ties mastro: la instrumento, kiu agas, estas de li nekonata, sed li povas ĝin utiligi. Tio estas vera en ĉiuj eksperimentaj sciencoj, en kiuj ni povas atingi nur relativajn aŭ partajn verojn, k koni la fenomenojn nur en iliaj ekzistokondiĉoj. Sed tiu kono sufiĉas al ni por etendi nian regadon super la naturo.

Ni povas produkti aŭ malebligi la aperon de fenomenoj, kvankam ni ne konas ties esencon, simple pro tio, ke ni povas reguligi iliajn fiziko-ĥemiajn kondiĉojn. Ni ne konas la esencon de la fajro, de la elektro, de la lumo, k tamen ni ties fenomenojn reguligas niaprofite. Ni tute ne konas la esencon mem de la vivo, sed malgraŭ tio ni reguligas la vivfenomenojn, tuj kiam ni sufiĉe konas iliajn ekzistokondiĉojn. Sed en la vivaj korpoj tiuj kondiĉoj estas multe pli malsimplaj k pli delikataj k sekve multe pli malfacile kompreneblaj ol en la malvivaj korpoj: en tio kuŝas la sola diferenco.

Klaŭdo Bernar (france: Bernard).

Reĝoj vizitas respublikojn...

La faktoj, kiujn traktis K-do F. S. en „S-ulo" n-o 383 sub supra titolo, pensigas min pri karakteriza kuriozaĵo, kiu okazis lastatempe en Saksio. La ĉefpersono de la afero laŭŝajne prezentas escepton inter la reguloj, ĉar li kiel eksreĝo rajtis reveni sian „propran" landon.

Kiel konate, ĝis 1918 Saksio estis reĝolando. La reĝo ŝatis konjakon k „amis sian popolon". Nur pro la specialaj cirkonstancoj en 1918 li abdikis, dirante la mirindajn, majestajn vortojn: „Faru vian koton solaj!"[1] Poste li transloĝiĝis en kastelon en Silezio, nomata Sybillenort (= Sibilejo), k funkciis tie kiel protektanto de faŝistaj formacioj. La bezonitajn milionojn da markoj liveris al li lia dankema popolo (kompreneble kontraŭ la volo de ties revoluciema parto). La eksreĝo mortis, la respubliko funebras. I. a. la ĉefurbestro de la iama reĝurbo Dresdeno k

[1] Malpli reĝe esprimite, tio signifas: „Prizorgu viajn aferojn mem!"

eĉ — mi ne povas ne mencii tion — la socialdemokrata prezidanto de la urba parlamento, estis kondolencintaj al la postrestanta parencaro de la mortinta eksreĝo. —

Antaŭ kelkaj tagoj la altranga kadavro estis transportata al Dresdeno. La ŝtataj k komunumaj domoj en tuta Saksio estis funebre mezmaste flagornamitaj. Registaraj, urbaj, armeaj, ekleziaj, faŝist-asociaj k multaj societaj reprezentantoj partoprenis la funebran ceremonion. Amasoj da scivolemuloj, inter ili multaj proletoj, premegis sin dum horoj sur stratoj k placoj. Pro troaj ekscitiĝo k interpremado 2 virinoj tuj sekvis al „sia reĝo", siavice mortante. Ilin trafis apopleksio. 120 personoj pro la ŝtreĉa, dumhora funebrado estis svenintaj. En la „kortega preĝejo" oni parad-elmetis la „majestan" kadavron sur katafalkon k fine entombigis ĉi tiun „plej superan generalon" je „ĉiuj militistaj honoroj"...

Tiel vizitis „nia reĝo" „sian respublikon" k tiel entombigis la saksa respubliko „sian reĝon". La mortinto eble estis koninta siajn iamajn regatojn. Oni rakontas, ke li rilate al ĉi tiuj okaze rimarkigis: „Vi ja estas kuriozaj respublikanoj!" Aŭ ĉu do ekzistas antaŭsentoj?

W. Riedel (16 652).

La klasbatalo tra la mondo

Komunista gvidanto en Slovakio kondamnita.

La ĉeĥoslovakiaj juĝistoj kondamnis la komunistan deputiton Major je 16-monata karcera puno, krome je monpuno de 2000 kronoj k nuligo de l' mandato. Li ne povas esti elektata dum 5-jara daŭro nek esti elektanto, plie dum tiu tempo ne rajtas praktiki sian profesion. Major estis instruisto, sed maldungita pro siaj ideoj. Tiu atako tamen ne deturnis lin de lia vojo. Li gvidis la agitadon en la fabrikoj, ĉe la kamparanoj de l'grafaj bienoj k ĉe la vilaĝanaj terkulturistoj, gvidis ankaŭ la batalon de tiuj lastaj kontraŭ impostego k oftaj aŭkcioj, por pli altaj salajroj k pli bona vivo.

Li estis arestata jam la 25-an de majo 1931 okaze de publika kunveno de la kom. partio en la de hungaroj loĝata vilaĝo (kun 150 loĝantoj) Nemeŝkosut. En la tuta Galanta distrikto tiam okazis ekbatalo por pli alta salajro (en la bienoj la kamparanoj ricevis nur 7-kronan salajron). Ĉeestis ĉ. 100 bohemaj ĝendarmoj, kiuj proklamis malpermesita la kunvenon, k kiam Major volis sciigi al la kunvenintoj pri la afero, la ĝendarmoj ekbatis k malliberigis lin, murdis 3 laboristojn k vundis multajn aliajn, inter ili maljunulinon. Ĝis la 17-a de decembro Major restis senjuĝa k tiam okazis la drakona kondamno pro „fripona k abomena ago". La revoluciemaj laboristoj k intelektuloj en Ĉeĥoslovakio ekprotestante montris la karakteron de tia juĝo, ĉar por ili Major restas sincera oferema lab. gvidanto. *Virgi.*

El Hispanio.

La revolucia agado de l'anarkistoj k sindikatistoj daŭrigas disvolviĝi. En Barcelono centoj da K-doj estas arestitaj. Cento inter ili estas deportitaj, sen plej eta formo de proceso, en nekonatan regionon, verŝajne en hispanian Gvineon. En Barcelonon alvenis militŝipo k aviadiloj; la policanoj disponas pri maŝinpafiloj. La militista polico estas plifortigita je 2500 homoj, dum oni aĉetis por 5 milionoj da pes. 60 ŝarĝaŭtomobilojn k 40 potencajn fajrestingajn pumpilojn.

Antimil. Gazetservo Harlemo.

Diktatoreco ĉe la rumanaj fervojoj.

Generalo Jonesku, ĝenerala direktoro de l'rumanaj fervojoj, estas vera diktatoro. Li maldungas la fervojistojn laŭ sia plaĉo. Por rezisti al la milita diktatoreco, la rumanaj K-doj fondis federacion, al kiu apartenas ĉiuj kategorioj de la fervoja personaro. Sed la cirkonstancoj malebligas al niaj K-doj komenci atakan batalon. La direkcio konstante provokas ilin esperante, ke la personaro spontanee sin defendos k la direkcio per tio ricevos pretekston por amasaj maldungoj. La malfacila situacio en la industrio malebligas al maldungitaj fervojistoj trovi alian laboron. Atendante pli bonan tempon, niaj rumanaj K-doj restas en defensivo, sed la venontaj okazoj trovos ilin batalpretaj. *ITF-Gazetarservo.*

La „laborista paradizo" de Ford.

Okaze de manifestacio gvidita de la komunistoj en Detrojt kvin laboristoj estas mortigitaj k granda nombro vunditaj (komence de marto). La batalo ekestis, kiam grupo el tri mil senlaboruloj invadis la fabrikojn de Ford ĉe River Ruĵ (Rouge) postulante laboron. Sesdek policanoj k la fabrik-gardistoj ekpafis; la mortigitoj troviĝas ĉiuj ĉe la flanko de la manifestaciantoj.

T. S.

El Estonio.

El 34 komunistoj, kiuj estis juĝataj de milit-tribunalo en Tallinn, pro konspiro kontraŭ la sekuro de l'ŝtato, la 4-an de marto, nur tri estis malkondamnataj, 5 estis kondamnataj al 12 jaroj da punlaboro, 8 al 10 jaroj k 4 al 6 jaroj; la ceteraj ricevis karcerpunojn de 3 monatoj ĝis 3 jaroj.

E. S.

Instruista mizeriĝo k batalemo.

En *Rumanio* instruistoj kunpuŝiĝis kun policanoj pro tio, ke la registaro vane venigis senlaborajn instruistojn al Bukaresto, esperigante ilin pri enoficigo. Pluraj estis vundataj. En 1931 estas malfunkciigitaj 50 universitatoj, 60 faklernejoj k 15 seminarioj. — En *Polio* la ŝtato fermis 10 litovajn elementajn lernejojn. — En *Anglio* la Ĝenerala Instruistina Asocio dum sia jarkomence okazinta kongreso postulis egalrajtecon kun la viraj kolegoj. En Irlando 6-pocenta salajrmalaltigo por la geinstruistoj. — En la insulo *Cejlono* la salajrpago por ili malantaŭas je 8 ĝis 14 monatoj, precipe en budaanaj lernejoj. — En *Ĉikago* (Usono) depost aprilo 1931 devas malsati 18 mil instruistoj sen salajro. La urbo ŝuldas al ili 20,5 milionojn da dolaroj. En protestkunveno partoprenis 25 mil geinstruistoj. 13 kolegoj estis arestataj k eldemandataj pri komunisteco.

Laŭ I.B.A. — S.A.

RELIEFAJ OKAZINTAĴOJ.

La franca registaro iniciatis la starigon de *Danublanda ekonomia konfederacio*, en kiu partoprenu ankaŭ Aŭstrio, sed ne Germanio. Ĝi estas kvazaŭ kontraŭprojekto kontraŭ la german-aŭstra dogan-unuiĝo, kiu fiaskis en la lasta jaro dank' al la forta kontraŭstaro ĉefe de l'francaj ŝtatistoj.

Japanio, atinginte sian provizoron celon en *Ŝanĥajo* per repremo de l'ĉina armeo je 20 km ekster Ŝanĥajo, konsentis batalhalton. La Ligo de Nacioj klopodas pri la *reguligo de l'konflikto*, sed ĝis nun ne trovis „akcepteblan formulon". — En nordo la japanoj proksimiĝis la limon de l'sovetia teritorio.

La Nankina registaro k Kuomintan-plenumkomitato decidis restarigi la *diplomatajn rilatojn kun Sovetio.*

Ribelmovado de l'„Lappo"-faŝistoj en *Finlando* kontraŭ la konstitucia registaro fiaskis.

Atenco de studento kontraŭ germana ambasadora konsilanto en *Moskvo* estas rekonita kiel farita pro politikaj motivoj. La sovetia registaro konsideras ĝin kiel manovron por ĝeni la nunajn intertraktojn inter Berlino k Moskvo pri havigo de monprunto al la sovetia industrio, por plua provizado ĝia per germanaj industriproduktoj.

Senpoveco k korupteco de l'*usona polico* montriĝis en ĥela lumo okaze de l'forrabo al la infaneto de l'fama aviadisto Lindberg. Ĉi lasta, malfidante al la policaj klopodoj, turnis sin pro helpo al du banditoj („gangster"oj)!

Kamelina (Camélinat), unu el la lastaj ankoraŭ vivintaj komunanoj de 1871, direktoro de l'ŝtata Monfarejo dum la Komuno, socialista deputito en 1885, ĉefkasisto de l'unueca partio dum longaj jaroj, post la skismo kompartiano, mortis la 5-an de marto en Parizo, 92-jara. La gazetaro laŭde elstarigis lian honeston, nekorupteblon k sinceron. La kadavro estis ceremonie transportata al lia provinca naskiĝloko.

Mortis la 7-an de marto Aristido *Brian* (Briand), unu el la plej eminentaj ŝtatistoj de l'epoko; malriĉa advokato, brila oratoro, li renegatiĝis de la socialismo k fariĝis bona servisto de l'burĝaro. Li servigis al si la „Ligon de Nacioj" kiel instrumenton, klopodante en la senco de unuigita Eŭropo sub la hegemonio de Francio. La pacistoj vidis en li la „apostolon de la paco". Laŭ voĉdono de l'Parlamento li „bone servis al la patrio" k pro tio havis „nacian enterigon".

La balotoj por regna prezidanto en *Germanio* de 13. marto donis jenajn pocentojn al la diversaj kandidatoj: Hindenburg (respublikanaj partioj) 49,6 %; Hitler (faŝisto) 30 %; Telman (komunisto) 13,3 %; Düsterberg (monarkisto) 6,8 %. — En sept. 1930 la Hitler-partio ricevis 18,3 % da voĉoj, la komunistoj — 13,1 %).

TRA ESPERANTIO

Publikaj leteroj al multaj SAT-anoj.[1]

VII

Karaj K-doj,

sendube la demando pri la enhavo de nia gazeto estas tre priparolinda temo, k volonte mi dediĉas al ĝi ĉi tiun leteron. Ne kredu, ke iam ajn mi havis la opinion, ke „S-ulo" plenumas perfekte la rolon, kiun oni povas atendi de esperantlingva organo, havanta legantojn en la tuta mondo. Nemalofte mi cerbumis pri la problemo. Jam en la jaro 1922 aperis en la julia n-o de la malnova *Sennacieca Revuo* sufiĉe ampleksa artikolo kun la titolo: *La spirita vivo de nia presorgano.* Tiun artikolon mi ĵus relegis k konstatas, ke mia opinio pri la demando restas preskaŭ la sama. Permesu do, ke mi citu parton el tiu artikolo:

„Unue mi notu, ke monata[2] revuo ne povas esti informhava pri aktualaĵoj; ĝi povas esti nur dokumenthava, t. e. enteni studaĵojn, tradukindaj por naciaj gazetoj.

„Ĝenerale ni ĉiuj estas tre nesciaj pri eksterlando. Mil faktoj, kiuj iafoje ŝajnas sensignifaj por enlandano, estas male tre interesaj por eksterlandano. Kiam iu skribas pri sia lando, li ĉiam pensu pri tio, kion li deziras ekscii el eksterlando. . .

„. . . Pri kio havas intereson nia legantaro? Estas facile respondi, se oni atentas pri la celo de nia entrepreno. El ĉiu lando ni deziras ricevi raportojn pri:

I-e *Vivkondiĉoj:* a) salajro, b) kosto de la vivbezonaĵoj, c) senlaboreco, d) labordaŭro k. s. — II-e *Ekonomia situacio:* a) ĉefaj industrioj. b) eksportado, c) importado, d) stato de la fervojaro k ŝiparo. — III-e *Politika k laborista movadoj:* a) nombro de anoj en la respektivaj organizoj; c) nombro de gazetoj kun la respektiva nombro de legantoj, d) intelekta k morala valoro de la gvidantoj ktp. — IV-e *Religia k liberpensa movadoj:* a) eklezioj, b) sektoj, c) filozofioj, d) moroj ktp. — V-e *Literatur-, art-, kleriga movado:* a) skoloj, b) tendencoj, c) gravaj verkoj ktp.

„Kompreneble por pentri tian ĝeneralan bildon, tio necesigas preskaŭ enciklopedian scion. Sed per opa kunlaborado estas eble atingi kontentigan rezultaĵon. En iu grupo kvar aŭ kvin K-doj povas ĉiu siaflanke serĉi k enketi pri la supre menciitaj punktoj. Ekzistas bibliotekoj, kiujn ili povas konsulti. En la daŭro de kelkaj monatoj estas eble per legado de revuoj k ĵurnaloj kolekti materialon por verki raporton. . ."

Hodiaŭ mi ne bezonas multon aldoni al tiuj miaj diroj el antaŭ dek jaroj. Se en ĉiu lando oni organizus tian laborkolektivon, estas tute certe, ke „S-ulo" povus fariĝi valora fonto el sciigoj, per kiuj la legantoj havas pli bonan komprenon, pli klaran bildon pri diversaj landoj ol la ĝenerala publiko. Tiel ilia esperantisteco donus al ili tiurilate veran superecon.

La L.E.A., kiuj estas konvencie ligitaj kun SAT, povus preni sur sin la organizadon de tiaj raportkomisionoj. Tio plifirmigos la ligitecon inter la pork peresperantaj aparatoj.

Kompreneble la raportoj devas esti tute objektivaj, k tie kuŝas eble la malfaciloj. Ĉu partiano kapablas raporti senpartiece pri alia partio aŭ eĉ pri sia propra? Mi ne riskas jese respondi tiun demandon. Eble kelkaj kapablas, sed mi dubas pri la plimulto. Konsciaj SAT-anoj, kiuj komprenas la veran signifon k uzatindecon de esperanto, devas tamen nepre celadi al objektiveco.

*

Se pro partiecaj kaŭzoj la priparolitaj raportkomisionoj ne povas laŭcele funkcii, estas eble prezenti al si alian bildon pri la enhavo de „S-ulo".

Unue mi volas rimarkigi pri la ekzisto ĉe la ĝenerala publiko de bezono esti pli malpli detale informita pri la diversaj opinioj k ideofluoj el la tuta mondo. Mi menciu ekzemplon: antaŭ unu jaro ekaperis en Francio grandampleksa, ĉiusemajna gazeto kun la titolo „Je suis Partout" (Mi estas ĉie), kiu estas plenigata preskaŭ ekskluzive per tradukoj ĉerpitaj el plej diverslingvaj ĵurnaloj. Tiu iniciato eĉ trovis baldaŭ imitanton k konkuranton. Jam de pluraj monatoj aperas alia gazeto pli multpaĝa, sed kun simila enhavo. Ĝia titolo estas *LU* (Legita) k ĝia subtitolo klarigas: *dans la presse universelle* (en la universala gazetaro). Ambaŭ apartenas al burĝaj firmoj. Tamen en ĉiu n-o de „LU" troviĝas artikoloj ĉerpitaj el la Sovetiaj gazetoj k tiel prezentantaj la oficialan komunistan opinion. Pri iu difinita mondpolitika problemo la plej diversaj k eĉ kontraŭdiraj vidpunktoj estas do prezentataj en la sama gazeto k iafoje en la sama n-o. Kredeble burĝaj legantoj devas ofte grumbli k kolereti ĉe tia legaĵo. Sed ili legas, tial ke ilia klaskonscio avertas ilin pri la neceso ĝuste koni la starpunkton de la „malamiko".

Ĉu la legantoj de „S-ulo" ne kapablas, simile al burĝoj, konatiĝi kun opinioj, kiujn ili ne aprobas? Mi facile prezentas al mi jenan enhavon por nia gazeto: Pri iu difinita politika problemo ĝi konsistus el la plena traduko aŭ resumo de artikoloj ĉerpitaj el anarkista, komunista k socialista ĵurnaloj el iu lando. Tiel la legantoj povus prijuĝi la tiean politikan atmosferon. La tradukinto ne bezonus mildigi la esprimojn, ĉar li ja ne havus respondecon pri ili.

Ĉu tiu mia propono estas efektivigebla? Mi ne povas aserti pri tio. Nur la sperto povus decidi. Almenaŭ ŝajnas al mi rekomendinda la eksperimento. Kaj se mi havus tempon, tre volonte mi komencus, rilate Francion.

*

Se troviĝas inter la SAT-anaro kompetentaj K-doj, mi povas ankaŭ rekomendi al ili jenon: Ili vizitu iun respondecan gvidanton de sufiĉe grava laborista organizo k metinte en liajn manojn ekz-on de „S-ulo" parolu al li proksimume jene: „Jen estas la organo de la proletaj esperantistoj; ĝi estas legata en la tuta mondo k eĉ ĝis trans la polusa cirklo (tiam vi montru n-on kun artikoloj de K-do Ruus); ĝi ja ne havas plurajn dekmilojn da legantoj, sed ĝenerale ili estas ĉiuj pli malpli kleraj homoj k multaj el ili tradukas k represigas en sialandaj gazetoj, la interesajn artikolojn, aperintajn en nia organo. Okazas tiel, ke artikolo estas iafoje represata en deko da diverslingvaj gazetoj tra la tuta mondo. Vi certe havas interesajn aferojn por konigi al tutmonda legantaro k tial mi petas, ke vi konsentu intervjuon aŭ, se vi preferas, ke vi verku specialan artikolon por nia gazeto. Niaj legantoj estos ankaŭ kontentaj konatiĝi kun via fizionomio k mi petas, ke vi aldonu vian portreton. . ."

Se vi lerte klopodas k ĉe oportuna momento, ekzistas multaj ŝancoj, ke vi sukcesos. Per tio vi trafos duoblan celon: vi propagandos esperanton al influhavaj gvidantoj k vi plivalorigos la enhavon de „S-ulo".

Ekzistas ankoraŭ aliaj rimedoj uzeblaj por atingi, ke nia gazeto fariĝu pli k pli inda je tutmonda legantaro; sed ĉi tiu letero jam fariĝis sufiĉe longa k do necesas, ke mi ĉesigu mian babiladon. Se inter vi, karaj K-doj, troviĝas kelkaj, kiuj pretas kunlabori laŭ la manieroj, kiujn mi menciis, ili bonvolu sciigi nin por ke ni povu aranĝi la aferon tiel, ke ne venu samtempe tro da materialo.

Dume estu kore salutataj de via

E. L.

[1] Komparu la n-ojn 376—384.

[2] La dusemajneco, eĉ la semajneco de „S-ulo" ne multe aliigas la kondiĉojn. Kaj eĉ se nia gazeto aperus ĉiutage, ĝi tamen ne povus esti tute aktuala por la legantoj el Usono, Japanio k. a. landoj malproksimaj de la ekspedejo.

12-a SAT-Kongreso en Ŝtutgart. 6.-11. aŭgusto 1932.

2-a Komuniko.

Ni konigas, ke la loka polic-direkcio provis fari malfacilaĵojn koncerne la okazigon de l'kongreso en Ŝtutgart. Nur post ankoraŭfoja interveno ni atingis, ke la polico konfirmis al ni skribe, ke sub la nunaj cirkonstancoj la kongres-aranĝo estas permesata, sed ke ni devos denove intertrakti kun la polica direkcio dum julio pro la projektata publika varbkunveno okaze de la kongreso.

Kongres-aliĝiloj: Bonvolu noti, ke ĉiuj aliĝiloj kiel eble plej baldaŭ k principe *nur* devas esti sendataj al K-do W. Neumann, Vogelsangstr. 66, *Stuttgart*, Germ. La SAT-perantoj povas ricevi ĉe tiu adreso pliajn preparitajn kongres-aliĝilojn.

Kongresejo: Ankoraŭ ni ne luis salonon. Estas multekosta afero, k unue ni devas scii, kiom da Gek-doj efektive partoprenos la Kongreson. Anoncu vin tial sufiĉe frue! Vi helpos nin per tio en niaj laboroj.

Loĝejoj: Laŭeble ni prizorgos por ĉiuj partoprenontoj, privatajn, *senkostajn* loĝejojn. Por tiuj, kiuj deziras loĝi en hoteloj, ni sciigas, ke ili devos pagi minimume po *3 mk.g.* tage. La junuloj antaŭvideble povos dormi en la loka junularhejmo (amasloĝejo) por 50 pf.

Vivtenado: Ĝenerale Ŝtutgart estas konata kiel urbo kun altaj prezoj. Tamen ni jam nun povas certigi al vi, ke estas eble tagmanĝi ekz. en la metalista hejmo k kelkaj aliaj bonaj restoracioj por 60—100 pfenigoj.

Veturprezoj: Favorprezojn por la kongresvizitontoj la regna fervojasocio k la Ŝtutgarta tramdirekcio povos garantii nur se partoprenos la kongreson konsiderinda nombro. Estus bone, se la Gek-doj organizus kongreskaravanojn.

Postkongresaj ekskursoj: Estos komuna ekskurso al laborista sunbanejo en la proksimo de l'urbo. Okazos ankaŭ gvidadoj tra la urbo. Plie ni zorgos pri vizito al la „naturamika domo Kniebis“ (posedo de l' proleta turista organizo internacia) per aŭtobuso. Tiu hejmo situas en la ĉarma „Nigra arbaro“. Tie la partoprenontoj povos tranokti. Elspezoj proksimume *5 mk.g.*

Grava peto: La 6-an de aŭgusto ni aranĝos publikan kunvenon, dum kiu parolados du K-doj pri la temoj: „La mondlingvo esperanto“ k „Kial ni laboristoj lernas esp-on?“ Por evidente montri al la ĉeestantoj, kiel esp-o praktike servas al la laborista klaso, ni ekspozos materialojn ricevitajn per esp. korespondado. Kiu volas subteni nin tiurilate, sendu aĵojn al la jam citita adreso. Estus ankaŭ dezirinde, ke sin anoncu ĉe ni negermanaj Gek-doj, kiuj estas pretaj paroli en la varbkunveno mallonge (5—10 min.) pri la cirkonstancoj en siaj landoj. Krom tio ni petas germ. SAT-anojn disponigi sin por tradukoj de la germ.lingvaj paroladoj de l'reprezentantoj de la lokaj lab. organizoj dum la salutvespero (7. 8.).

O. K. K.

1-a listo de partoprenontoj.

1.	30	Deubler Konr., München	(Germ.)
2.	5488	Schneider Wilh., Sulzgries	(Germ.)
3.	17447	Roth Hans, Eßlingen	(Germanio)
4.	2429	Breddermann Osk. Eßlingen	(Germ.)
5.	9332	Lievestroo Jan, Zwolle	(Holando)
6.	14946	Van't Hof, Amsterdam	(Holando)
7.	16992	Klatil Erna, Amsterdam	(Holando)
8.	90	Lerchner Richard, Leipzig	(Germ.)
9.	2465	Lerchner Charl., Leipzig	(Germ.)
10.	10614	Göppner Rudolf, Leipzig	(Germ.)
11.	16860	Friedrich Kurt, Gränitz	(Germ.)
12.		Ulo, Stutgart	(Germanio)
13.	17017	Van der Griend, A. Amsterd.	(Hol.)
14.	4396	Steiner Franz, Stuttgart	(Germ.)
15.	16900	Wettig Oskar, Gelnhausen	(Germ.)
16.	17381	Wettig Lissy, Gelnhausen	(Germ.)
17.	13607	Roosing Arend, Zeist	(Holando)
18.	8815	Fuchs Hubrecht, Den Ilp	(Holando)
19.	16599	Duif Anni, Amsterdam	(Holando)
20.	13552	Melchinger Fr., Geislingen	(Germ.)
21.	16940	Moesmer Erw., Geislingen	(Germ.)
22.	16941	Kühnle Fr., Geislingen	(Germ.)
23.	17557	Maier Matth., Ettlenschieß	(Germ.)
24.	14624	Moravec Franc., Ottersleben	(Germ.)
25.	17678	Wagner Rosel, Stuttgart	(Germ.)

Junular-tendaro:

Kune kun la Ŝtutgartaj Gek-doj mi intencas prepari junular-tendaron. Ĝi okazu antaŭ la 12-a Kongreso en la proksimo de Ŝtutgart. K-do Ŝnajder, Sulcgris, eltrovis taŭgan lokon, la „Katharinenlinde“. Estas gimnastikejo sur monto ĉe arbara rando kun bela vido super la tuta regiono k al la malproksima Alb-montaro. Ĉe malfavora vetero ni havos la permeson disponi ankaŭ pri la gimnastika domo. Atingebla estas la loko per 1¼-hora marŝo de Obertürkheim aŭ de Eslingen, urboj, al kiuj vi povas veturi de Ŝtutgart per fervojo aŭ per tramo. La tendaro daŭru tutan semajnon. Ni intencas aranĝi dum tiu tempo alterne ekskursojn, ludojn k kursojn; eble ni povas studi teatraĵon aŭ ion similan por prezenti dum la adiaŭa vespero de l'Kongreso. Pri la kostoj diri jam ion certan ankoraŭ ne estas eble; kredeble ili ne estos altaj; definitivan sciigon pri tio, same kiel pri programo ktp, ni povas komuniki nur, kiam ni scias la proksimuman nombron da partoprenontoj. Ĉiu, kiu deziras partopreni la tendaron, menciu tion sur la Kongres-aliĝilo. Krome li (ŝi) sin *anoncu ĉe K-do Vetig, Gelnhausen, Germ.* Sportul(in)oj k naturamik(in)oj, kiuj posedas tendon disponeblan bonvolu mencii tion. Ne prokrastu aliĝi. Pliaj komunikoj sekvos sur la „J. P.“

Ĉu necesas skribi multon pri la valoro de tia tendaro? Ni ĉiuj ja scias k komprenas, kiel taŭga estas tia okazo por interkonatiĝi k amikiĝi kun proletaj Gek-doj ĉiulandaj. Ni, la iniciatantoj de l'tendaro, esperas, ke ĉi tiu kreu pli firman ligon inter ni junaj SAT-anoj, junaj prolet-esperantistoj.

Amikece! Vetig (16 900).

Ĉe la Laboristaj Esperanto-Asocioj.

La lab. esp. movado en Norvegio.

Dum la lastaj 4 jaroj la norvega LEA (Arb. Esp.-Forbund i Norge) travivis tre malfacilan periodon, kaŭzitan de malhonestaĵoj de iu K-do, k pro la nuna malbona situacio de la laboristoj; multaj perdis la fidon al LEA. Pro tiuj cirkonstancoj ĝi preskaŭ bankrotis k estis devigita vegeti.

Sed, lastan vintron, ni povis konstati pligrandiĝantan intereson. La 4. febr. okazis en la Popoldomo de Oslo ĝenerala kunveno de LEA, k precize je la 19-a horo la ĉambro estis plena. Tiel multajn ĉeestantojn ni ne vidis dum multaj jaroj, k la kunveno havis bonan sukceson, certe estis turnpunkto por la esp. lab. movado en Norvegio. Grava estis ekz. decido pri kunlaborado kun *Laborista Klerig-Asocio*, kiu pli bone povas aranĝi kursojn buŝajn k perkorespondajn, reklamadi ktp. Per ĝia helpo ni certe atingos tre bonajn rezultojn.

Kiel en aliaj landoj, ankaŭ ĉe ni la opoziciularo lastatempe „montris siajn dentojn“. Ĝi estis forte reprezentita ĉe la kunveno, kiu estiĝis tre vigla. Tiel ili vole nevole helpis pligrandigi la intereson. Antaŭe ekzistis en Oslo nur *Lab. unuiĝo esp-ista* (Arb. Esp.-Forening). Sed depost la pasinta somero por kelkiuj eble la loko estis tro malvasta; ili forlasis LEA-on k fondis propran klubon „La Proleto“ (kun propra gazeto samtitola, kiun ili subnomas „Bulteno de prolet-esp-istoj en Norvegio“). Oni ne devas interŝanĝi ĝin kun „Arbeideresperantisten“, la organo de LEA.

La opozicio ŝajne bone laboras siamaniere, sed estas en absoluta malplimulto k ne povas malutili al LEA. Kontraŭe, ili vekis multajn LEA-anojn, kion ili certe ne deziris.

Por ke LEA povu persisti pri sia senpartieco, estas aktuale aliigi la statuton. LEA devas esti senpartieca, devas esti loko por socialistoj, komunistoj, senpartiuloj ktp., nur por esp-o, ne por politika agitado. Ankaŭ alia grava afero estas ordigita: preso k eldono de nova lernolibro; ĝis nun ni uzis plejparte lernolibrojn verkitajn en dana lingvo, kiu estas proksimume la sama kiel norvega laŭ malnova ortografio. Kiam tiu ĉi malmultekosta lernolibro aperos, granda manko estos forigita.

En Oslo troviĝas pluraj esp-istaj kluboj; ĉiuj aranĝis dum la vintra sezono kursojn, kiuj tre bone efikis. Ĉiuprofesiaj laboristoj partoprenis, k la plejparto aliĝas al LEA. Ankaŭ en diversaj landpartoj okazas vigliĝo de la movado, precipe en la nordo, ekz. en Narvik, Trondhejm k.a. Ŝajne la esp. movado nun antaŭenmarŝas en tuta Norvegio.

16 788.

La unua lab. esp. hejmo en Amsterdamo.

La Grupo Zamenhofa (V-a sekcio Amsterdama de F.L.E.[1]) sciigas jenon: Antaŭ 3 jaroj en majo fondiĝis nia grupo en la okcidenta kvartalo de Amsterd. Ekde la stariĝo de tiu grupo jam montriĝis, ke en la nomita kvartalo regas intereso por nia afero, kiu kreskis k kreskadas en la daŭro de l' ekzisto de la esp.sekcio. La grupo fariĝis tro multnombra k kvar novaj sekcioj estis fondataj. Proks. 500 kursanoj enskribiĝis. Pli granda kunvenejo necesiĝis.

Ni sukcesis lui loĝejon en la kvartalo, konsistantan el du sufiĉe grandaj ĉambroj, koridoro k kuirejo, ankaŭ ĝardeno. Ni povas dividi la salonon en du partojn per du vitraj pordoj, tiel ke estas du salonetoj. Kiam ekzemple okaze de interna kunveno ĉeestas multaj personoj, la pordoj povas esti malfermataj k ni havas salonon por 100 personoj.

La instalo de nia hejmo postulis multe da laboro. Feliĉe ni estas gelaboristoj, inter kiuj regas bona spirito de kamaradeco. Tuj anoncis sin Gekdoj ĉarpentistoj, elektristoj, pentristoj, purigistinoj, kudristinoj ktp, k post 14 tagoj la hejmo estis ordigita. La 24-an de febr. okazis la malfermo. K-do Faulhaber, prezidanto de N.F.L.E., transdonis solene la ŝlosilon al nia prezidanto, K-do Veen. Ĉeestis tiuvespere proks. 90 personoj. Diversaj sekcioj sendis delegitojn. Multaj floroj ornamis la tutan hejmon. La I-a Amsterd. sekcio donacis du belajn pentrojn, la XIIIa ankaŭ promesis donacon. La Grupo Zamenhofa metis en sian propran domon „terglobon".

La estraro havas grandiozajn planojn, kiujn ĝi esperas efektivigi, por ke ankaŭ iam la Amsterd. gelaboristoj estu varbitaj al nia bela idealo, k ne nur ili, sed la tutmonda Gek-daro!

Sekretariino 15 408.

Pri esp. gazeto en Portugalio.

K-do Soares miras (en n-o 383) pri la duonneŭtraleco de l'antaŭ nelonge aperinta „La Okcidentulo". Jen mallonga klarigo pri la afero: La sola lab. esp. organizo en Portugalio estas „Nova Vojo"; la „Ligo de Okcidentaj Espistoj", antaŭ nelonge fondita en Lisbono, ne sin prezentas kiel lab.organizo k ne malkaŝe propagandas pri esp-o ĉe laboristoj. Okaze de l'Zamenhofa datreveno la Ligo decidis aperigi „La Okcidentulo"-n, kies enhavo estas neŭtraleca, laŭ ĉies opinio. La dua n-o inklinas al laboristaro, kio pruvas, ke la unua n-o povus enhavi nur prolettendencan materialon. Tamen, tion ne volis la eldonintoj, kiuj preferis inviti al kunlaboro la sinjoron nomitan de K-do S. — Resume, „la Okcidentulo" ne estas organo de l'proleta esp. movado en Portugalio, k „Nova Vojo" havas nenian respondecon pri ĝi.

La Komitato de „Nova Vojo".

[1] Ned. LEA.

Malsprita Komedio

Kvankam la skismigantoj de nia movado daŭrigas mensogi, kalumnii k insulti, la legantoj povis tamen konstati lastatempe, ke ni simple ignoris tion k silentis. Ni opinias necese tamen firme certigi la malverecon de ĉi tio, kio aperis en la n-o 17-18 de la „Bulteno" de SEU:

„La Revizia Komisiono atentigas, ke siatempe eksmembro de SEU — Lidin — prezentis al la respektivaj partiaj instancoj ĉiujn materialojn de la direkcio de SAT kontraŭ K-do Drezen. Tiuj tre ampleksaj materialoj estis dufoje tre detale esploritaj de tre aŭtoritataj partiaj kontrolorganoj. . . "

Neniam ni liveris al Lidin iun ajn dokumenton. Vero estas, ke ni mem havis en la manoj leterojn de Lidin, kiu akuzis Drezen k Demidjuk. Kaj *neniam ni uzis tiujn dokumentojn* ĉu en la gazeto aŭ dum niaj paroloj ĉe kongresoj. Tiuj leteroj ankaŭ **ne** estis liverataj al la Kontrol-Komitato k sekve la juĝo de tiu instanco ne sin bazas sur dokumentoj liveritaj de Lidin.

Laŭ la sama fonto, ĉi tiu lasta estas reakceptita en S.E.U. Nu, tio helpas kompreni la tutan komedion. . .

Direkcio de SAT.

Jezuita friponeco

En „Isto" n-o 33 aperis recenzo de anonimulo pri „Eŭgeno Onegin" de Puŝkin, pri kiu ni ne povas tute silenti. Tiu libro estis presita en Moskvo, stokita ĉe SEU k *Ekrelo*, sed trompe provizita per falsa marko: kiel eldonanto estas ja indikita la nomo de *SAT*. Efektive la libro *ne* estas nia, ĉar SEU tenas la tutan stokon. Sed per tiu falso oni povis senhonte aserti, ke SEU presis por SAT libron ankoraŭ en 1931!![1] Tiu faro estas jam sufiĉe fripona; sed al tio aldoniĝas perfekta jezuiteco. La legantoj juĝu mem: „Kvankam neniu volas nei la historie literaturan gravecon de Puŝkin k lia „Eŭgeno Onegin". ĉi verko tamen ankoraŭ pruvas, ke SAT ĉesis esti la organizo de la proletaro. . . . " ! ! !

[1] Komp. la n-on 366/67, p. 18.

Kiel organizi k gvidi perfektigan kurson?

Tiun demandon mi prezentis al mi multfoje. Ofte ja estas tiel, ke niaj novuloj en esperanto post studado dum unu vintro en niaj kursoj por novkomencantoj plej ofte bezonas partopreni perfektigan kurson. En Boras ni dum kelkaj jaroj spertis, ke multaj partoprenintoj de niaj elementaj kursoj post ilia finiĝo forlasas nian aferon, ne vizitas la klubajn kunvenojn, ne abonas al esp-gazeto, k baldaŭ forgesas ĉion lernitan.

Kompreneble oni ne povas postuli, ke ĉiu semo estu fruktodona, sed ni ankaŭ devas konstati, ke ni ne ĉiam atentas la novulojn. Certe starigo de perfektigaj kursoj por tiuj, kiuj vere interesiĝas pri la afero, estas gravega tasko por ni. Nia movado ja ĉiam bezonas alfluon de laborvolo k entuziasmo, k kursgvidanto, laborinta dum du aŭ tri jaroj, certe baldaŭ trovas, kiuj el lia anaro montras emon profunde ellerni la lingvon, k trovinte tiujn valorulojn, kiuj en esp-o ne nur vidas la mirindan lingvon, sed ankaŭ komprenas ĝian gravegan rolon por la tutmonda proletaro, estas nia absoluta devo starigi perfektigajn kursojn.

Nia loka esp. klubo, antaŭ kelkaj monatoj komisiis al mi aranĝi k gvidi tiun gravan laboron. Sed kiel plej bone solvi la problemon, jen la demando, kiun mi proponas pridiskuti? Mi kredas, ke tiu demando estas aktuala en multaj grupoj. Mi volas iom rakonti, kiel mi mem agis por solvi la problemon.

Nia studrondo konsistas el dek K-doj, kiuj dum la pasinta vintro formis la kernon en du studrondoj. La celo por ĉiu estas korekte skribi k paroli nian lingvon.

Ni kunvenas en unu vespero ĉiusemajne k ni partigas la tempon en tri partoj. Dum la unua duonhoro ni legas el Lingvaj respondoj. Poste sekvas horo, en kiu unu ĉe la antaŭa kunveno elektita K-do laŭtlegas artikolon aŭ rakonton originale verkitan de li. Mi k ĉiuj K-doj atente aŭskultas k rimarkante gramatikan eraron, mallertan esprimon aŭ nebonan vortelekton, mi skribas la kritikatan frazon sur la nigran tabulon k ni kolektive klopodas plibonigi la frazon. Ĉiu devas verki artikolon pri ia temo decidita antaŭe ĉe kunveno, k ĝis nun ĉiuj akurate plenumis tiun taskon.

La lasta k plej interesa parto de niaj studkunvenoj estas la lasta horo k ĝi okazas ĉiam nur en esp-a lingvo en formo de interdiskuto, kies celo estas igi la partoprenantojn rapide k korekte mem konstrui bonajn frazojn en esp-o. Tamen ni neniam hazarde diskutas temon, sed ĉe kunveno antaŭa ni decidas pri la diskutota temo, k la partoprenantoj mem decidas pri ĝi. Jam pridiskutitaj temoj estas interalie naciismo, alkoholtrinkado, pacismo, vegetarismo ktp. En la nun okazontaj kunvenoj ni pritraktos la religion. Antaŭ ĉiu diskuto mi faras dekminutan enkondukan paroladon pri la temo. Ni ĉiam klopodas prezenti malsimilajn opiniojn, k okazas kelkfoje tiel, ke komunisto defendas la kapitalismon k naciismon k ne malofte ateisto aperas kiel eklezia pastro plena je metafiziko. Niaj diskutoj ĉiam estas viglaj k interesaj k mi kun ĝojo povis konstati.

ke eĉ ordinare silentema K-do sentante sian opinion en momenta danĝero, vigle k kun elokventa ardo ekpartoprenis la diskuton.

Jes, tiel pasas niaj vesperoj, k laŭŝajne miaj K-doj estas kontentaj. Tamen estas tre interese k utile scii, kiel vi, K-doj en aliaj lokoj, aranĝas tiun aferon. *V. Ekström.*

Eltirita el „Sveda Lab. Esperantisto" (jan. 32).

Esperanto ĉe la socialista partio de Nederlando.

(Subtenu per alsendo de leteroj)

La socialdemokrataj esperantistoj en Nederlando dum kelkaj jaroj sendis pere de siaj partisekcioj al la ĉiujaraj kongresoj proponojn favore al esp-o. La nombro da sekcioj, kiuj akceptis tiujn proponojn, kreskis en la nuna jaro ĝis pli ol 30. Inter la kongresproponoj tiuj pri esp-o okupas gravan lokon. Jam aperis antaŭ 2 jaroj raporto favora al esp-o, sed la partiestraro ne klopodis ĝis nun efektivigi la konkludojn. Tial mi petas la lab.esp-istojn ĉiulandajn helpi nin en nia agado k sendi grandnombre klubajn aŭ personajn leterojn al la kongreso de l'socdem. partio, postulante la akcepton k efektivigon de l'esp. proponoj. La kongreso okazos de 26.—28. marto. Adreso de l'kongresejo: *Gemeentelike-Konsertzaal* (komunuma koncertejo), *Haarlem.* Nederl. *H. W. A. (13 025).*

La neŭtraluloj en la krizo.

Ke ankaŭ la neŭtrala esp. movado suferas sub la frapoj de la granda ekonomia krizo, evidentiĝas el alvoko, kiu aperis en la februara n-o de ESPERANTO, la organo de U.E.A. „Ĉu UEA pereu pro la nunaj cirkonstancoj?" demandas la Centra Oficejo de UEA siajn membrojn, alvokante ilin aliĝi kiel *subtenantoj* por forigi la danĝeron. „Per *mil* subtenantoj ni venkus, se ne glore, almenaŭ honeste."

MEMORNOTO

Represis el „S-ulo":

Der Funke, Berlin, 26. 2., porlerneja batalo en Belgio (383), 3. 3., „leĝo k ordo" en Kalif., malsatego en Jap. (384); *Volksstimme* Hagen, 19. 12., faŝismo en Kalif. (372/3).

Peresper. materialon enpresis:

Neue Zeitg., München/Nürnb., 8., 9., 15., 10., 26. 2.; *Bay. Echo*, Münch., 20. 2.; *Der Funke*, Berlin, 25. 2., 26. 2. (de K-do Aarse).

RADIO-PROGRAMO:

25. marto:
22.00–22.30: Leningrad, 1000 m, informoj (samhore: 29. marto, 2. aprilo).
26. marto:
21.15–21.25: Lyon-la-Doua, 466 m, Humora dialogo (informoj samhore je 2. apr.)
27. marto:
9.00– 9.30: Ljubljana, 576 m, parolado (same je 3. aprilo).
22.00–22.30: Minsk, 700 m, informoj (same je 29. marto [?]).
31. marto:
21.15–21.35 ? : Kaŭnas, 1935 m, parolado.
22.35–22.45: Breslaŭ-Gleiwitz.
3. aprilo:
9.10– 9.35: Hilversum, 298 m, kurso.
10.30–11.00: Stokholmo, 435,4 m, Motala, 1348 m k relajoj, esp. k blinduloj.

NIA POŜTO

10 662. – Jes, „Al frato" aperos en „LNE".

J. R., Lens. – *K-do* estas la mallongigo por „Kamarado".

10 512. — Uzeblaj.

Gek-doj Brujn. – Via anonco kostas –.75 guldenon.

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. – Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

AŬSTRIO

5 K-dinoj (17, 20, 24, 40 j.) volas koresp. kun K-doj; 10 K-doj (18–30 j.) kun K-dinoj. La grupo ankaŭ kolektive koresp. Resp. garantiata. Adr.: Dir. A. Schneider. *Hohenberg.*

ESTONIO

20 novaj esp-istoj dez. koresp. kĉl, grupe k individue; L, PK, PI. Skribu al: Esperanta Rondeto, *Leisi.*

La Memoron PLIFORTIGAS k PERFEKTIGAS laŭ metodo trifoje premiita de la Pariza Akademio Prof de memoniko D. FAJNŜTEJN-VILNO, Zawalna 15 (Pollando).

Dank' al mia metodo, bazita sur leĝoj de **psikologio, fiziologio, logiko k pedagogio, la MEMORO restariĝas** ĉe tiuj personoj, kiuj ĝin perdis, **pliboniĝas** ĉe tiuj, kiuj havas malbonan k **perfektiĝas** ĉe tiuj, kiuj havas bonan; samtempe **foriĝas la DISTRECO k maldiligento, fortiĝas la VOLO k pliboniĝas ĉiuj psikaj kapabloj** ĉe personoj ĉiuaĝaj.

Postulu senpage prospektojn de la memorfortiga kurso en esperanto.

GERMANIO

12 Gek-doj koresp. kun eksterl. samideanoj ĉl., pri ĉ. temoj, L, PK, PI. Resp. garantiata. Skribu al: Hermann Sorge, Siedlung Pfarraue, *Rödlitz b. Lichtenstein-C./Sa.*

SEA-Grupo de D-dorf-Oberkassel koresp. kĉl, L, PI. Skribu al: K-do Franz Neuburg, Heerdter Sandberg 27/2, *Düsseldorf-Oberkassel.*

K-do Herbert Gruhle (24-j.), Oststr. 98/II.l., *Leipzig C 1,* pri ĉ. temoj, kĉl, pref. kun Sovetio. Certe resp.

La 24. 4. 1932 okazos en Durlach la 1-a badena lab. esp. renkontiĝo. Ni petas ĉl. Gek-dojn, sendi al ni L, PK, PI, por nia propagandvespero. Ni certe resp. Adr.: K-do August Weiler, Pfinzstr. 99, *Durlach/Bad.*

22 esp-istoj (18–30 j.), finiĝintaj la kurson antaŭ 3 semajnoj koresp. kĉl. Gek-doj, pri ĉ. temoj. Resp. garant. Skribu multnombre! Adr.. Ernst Georgi, Südstr. 95, *Merkstein, I/Aachen.*

El la limurbo Aachen koresp. kĉl, pri ĉ. temoj, K-doj Nikolaus Bourmann (21 j., ŝuisto), Trierer Str. 24, k Martin Schütt (25 j., teksisto), Krautmühlenweg (ambaŭ en *Aachen-Forst*).

K-do Gerhard Hübner, Pestalozzistr. 146, U., *Schlettau/Erzgeb.*, kĉl.

NEDERLANDO

12 gelernantoj aranĝas la 7. 4. 32, letervesperon. Sendu L, PK, PI al: Gek-doj Bruijn, Noordeinde 64, *Wormeveer.* Ni certe respond.

13 j. knabo koresp. kun knabo samaĝa. Adr.: S. Kozyn, Nieuwe Uilenburgerstr. 56/II, *Amsterdam (C).*

K-do B. Vuysje, Retiefstr. 60/III., *Amsterdam (O),* kĉl. Gek-doj, pri ĉ. temoj.

4 K-doj koresp. pref. kun gelaboristoj, kiuj laboras en linoleumfabrikoj. Skribu al: K-do J. Koomen, *Assendelft.*

K-do C. J. Coppens, Meermanstr. 60,*Rotterdam.* interŝ. PM. Sendu unue! Resp. garant.

SOVETIO

Laboristoj, scienclaborantoj-ĥemiistoj k de Scienca Instituto protektataj infanoj-lernantoj volas koresp. pri sciencaj, politikaj k.a. temoj. Adr.: *Leningrado* 3 Vatnij Ostrov, L.I.P.H., Esperanto.

K-do *Konovalov* E., Ropŝinskaja 12 kv. 9, *Leningrad 3.* dez. kor. kĉl pri ĉt. Fotoamatoro k telefonisto.

K-do *Organezov* L., str. K. Marks 18, *Telav* (Kartvelio), kĉl pri ĉt kun seriozaj Gek-doj.

SVEDIO

K-doj Sigvard Svensson, *Fälhult,* k Georg Olsson, *Östafors,* kĉl, prec. kun sudorientaj k ekstereŭropaj, L, PI.

En 2 laponiaj urboj 80 p. dez. koresp. Ni tuj k certe resp. Adr.: K-do Neeme Ruus, Backg. 5, *Luleä.*

Mi donas senkostan loĝejon k pensionon dum 1–2 somermonatoj en mia hejmo por tiu malmulte postulema kolego, kiu donos la saman al mi en somero 1933. Adr.: Popollerneja instruisto A. Seppel, *Leisi* (Estonio).

ENHAVO

paĝo
Ŝtutgart, la urbo de la 12-a SAT-Kongreso . . . . 141—142
La perspektivoj de la hispana revolucio . . . . 142—144
Ni ĉiuj vivigu „LA NOVA EPOKO"-n . . 143
Pri la komunumaj loĝdomoj en Vieno 144
El Portugalio . . . . 144—145
Kiu eraras pri la alkohol-malpermeso en Usono? . . 145—146
Letero al eksterlandaj laboristoj 147
Por nia medito 147
Reĝoj vizitas respublikojn . . . 147—148
La klasbatalo tra la mondo . . 148
Tra Esperantio . . . . 149—152

K-doj el la germanlingvaj regionoj – atentu!

La Socialista Esperanto-Asocio (SEA) por la germanlingvaj regionoj eldonis la broŝuron de K-do E. Lanti

LA LABORISTA ESPERANTISMO

en germana lingvo. – Aĉetu tuj! Prezo: 0,30 gm. Grupoj ricevas 10 % da rabato! Vendu ĉi tiun gravan verketon inter la neesperantista laboristaro. Mendu tuj ĉe la

SEA-librejo, FRANKFURT a. M. 21, Heerstrasse 85.

Presejo Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)